


**GUIDILO  
TRA LA  
ESPERANTO-MOVADO**

DE G. P. DE BRUN



ASOCIACION  
MUNDO  
LABORISTAJ  
ESPERANTISTOJ

AMSTERDAMO  
PARIZO 1936

Pt. 5.50- (F. 0.50)

DRIKKERIJ DICO

0102


GVIDILO TRA LA  
ESPERANTO-MOVADO

DE G. P. DE BRUIN



---

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA KAJ  
FEDERACIO DE LABORISTAJ ESPERANTISTOJ



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANIA ESPERANTO FEDERACION

## ANTAŬPAROLO.

Estas dezirinde, ke ĉiu esperantisto estu informita pri la plej gravaj faktoj, okazintaĵoj kaj institucioj de la movado. Ĉi tio validas ankaŭ por laborista esperantisto.

En la esperanta literaturo troviĝas jam diversaj verkoj pri la historio de la movado. Sed ĉi tiuj unuflanke donas tro da detaloj, kiuj por laborista esperantisto ne havas multan valoron kaj aliflanke ili tute aŭ preskaŭ tute ne pritraktas la Esperanto-movadon laboristan.

Ĉi tiu verketo celas skizi en konciza formo bildon de la tuta movado. Ĝi volas ebligi la akiron de la plej necesa scio pri la esperanta movado, laŭ pli facila maniero ol ĝis nun estis eble.

Ke ĝi tiun taskon plenumos sukcese, esperas

LA VERKINTO.



## Ĉe la dua eldono.

La okazintaĵoj el la lastaj jaroj grave aliigis la aspekton de nia movado kaj pro tio necesis pluraj ŝanĝoj kaj aldonoj en la teksto, per kiuj la libreto fariĝis denove kompleta kaj aktuala.

Por faciligi al la studantoj la kontrolon, ĉu oni bone encerbigis la enhavon de la libreto, ni aldonis kvanton da demandoj pri la ĉefaj faktoj menciitaj.

La sperto montris la bezonon de kelkaj ŝanĝoj en la tipografia aranĝo. Sed por eviti rekompostadon de la tuta teksto, ni faris tiujn ŝanĝojn nur en la nove kompostitaj ĉapitroj. Jen la kaŭzo de la neunuforma aranĝo de la teksto.

LA VERKINTO.



# I. ANTAŬ ESPERANTO.

## 1. Unuaj provoĵ.

Kvankam nur en la lastaj 50 jaroj, sekve de la grandega disvolviĝo de la tutmonda trafiko kaj pro la grava plimultiĝo de la internaciaj rilatoj, la problemoj pri internacia lingvo iĝis aktuala kaj urĝa, oni tamen jam multe pli frue okupis sin pri ĝi.

Jam en la 17-a jarcento famaj homoj, kiel Descartes (Dekart), Leibnitz (Lajbnic), Komensky (Komenski) k. a. aludis la eblon konstrui universalan interkomprenilon. Eltrovemoj, kiel J. J. Becher (Beĥer), de Ria, J. Wilkins, C. Wolke kaj multaj aliaj kunmetis projektojn de internacia lingvo. Ĉi tiuj estis ĝenerale t.n. paziĝrafioj (skriblingvoj). Ili konsistis el pli malpli logike kombinita sistemo de signoj, kiuj reprezentas ideojn. Lingvoj paziĝrafiaj nur taŭgas por skribaj interrilatoj.

Pli malfrue, en la 19-a jarcento, oni projektis lingvojn pazialiajn, t.e. lingvojn, en kiuj la ideoj estas esprimitaj per vortoj, konforme al la eŭropa lingvokonsisto. Ĉi tiuj lingvoj estas, almenaŭ teorie, paroleblaj kaj oni dividas ilin laŭ 3 grupoj, nome: 1. sistemoj aprioraj, kiuj konsistas el arbitre elpensita materialo; 2. sistemoj aposterioraj, por kiuj la fundamenta materialo estas prenita el naturaj, ĉu vivaj, ĉu malvivaj lingvoj; 3. sistemoj miksitaj, kiuj estas parte aprioraj kaj parte aposterioraj.

Antaŭ Esperanto, kiu apartenas al la sistemoj aposterioraj, aperis centoj da diversaj lingvo-projektoj. Nur unu el ili, Volapuko, atingis ioman disvastiĝon.



## 2. Volapuko.

Volapuko estis publikigata en 1880 de J. M. Schleier (Ŝlajer) en Konstanz. Ĉi tiu lingvo estis bazita sur la angla lingvo, ĉar ĉi tiu, laŭ la aŭtoro, estas „la plej disvastigita el ĉiuj lingvoj de la civilizitaj popoloj.” Tamen oni ne multe retrovis ĉi tiun lingvon en Volapuko, ĉar la vortoj estis ŝanĝitaj ĝis nerekonseblo. La vorto Volapuko ekzemple devenis de la vortoj *world* (mondo) kaj *speak* (lingvo). Same ŝanĝitaj estis aliaj vortoj. Tre ofte oni trovis en ili la sonojn *ä, ö* kaj *ü*, kiuj estas malfacile prononceblaj al multaj popoloj. Granda nombro da vortoj tre similis unu la alian kaj estis malfacile

distingeblaj. Krome la unusilabeco de multaj vortoj malfaciligis la memoreblon.

Malgraŭ ĉi tiuj malperfektaĵoj la lingvo relative multe disvastiĝis. En 1889 jam funkciis 283 volapukistaj societoj. Lernolibroj estis eldonitaj en 25 lingvoj. Ekzistis jam 384 libroj, broŝuroj kaj aliaj eldonaĵoj en Volapuko. Aperis 25 gazetoj kaj revuoj, el kiuj 7 tute en Volapuko.

En 1884 okazis en Friedrichshafen (Fridriŝshafen) la unua volapukista kongreso, en 1887 en München (Munĥen) la dua. En ĉi lasta oni starigis Internacian Akademion de Volapuko, kiu zorgis pri la regula evoluo de la lingvo, pri la konservo de la unueco kaj la plivastigo de la vortaro.

En 1889 okazis en Parizo la tria kongreso, kiun ĉeestis ĉ. 200 volapukistoj. Raportado kaj diskutado okazis nur en Volapuko. Ĉi tie ree montriĝis la malfacilaĵoj kaj malperfektaĵoj de la lingvo kaj la neceso reformi ĝin. Pro tio la kongreso komisiis al la Akademio kunmeti simplan gramatikon, sen iu superflua regulo.

Mankis en ĉi tiu kongreso unueco kaj konkordo. Schleier postulis por si la absolutan decidpovon, ne agnoskis la kongreson kaj ĝiajn decidojn, eksigis diktatore la Akademion kaj starigis novan.

Ĉi ĉio signifis la komencon de iom-post-ioma disfalo de la volapukista movado. La (malnova) Akademio ankoraŭ aperigis novan gramatikon, sed ĉi tiu ne plu utilis. Poste ĝi forlasis Volapukon kaj konstruis tute novan lingvon *Idiom-neutral*. Sed ankaŭ ĉi tiu ne sukcesis kaj mallongan tempon poste la tuta volapuka movado estis mortinta. La fiasko de Volapuko tre malutilis al la ideo de mondlingvo. Pro ĝi la homoj ekdubis pri la eblo de artefarita lingvo kaj seninteresiĝis pri ĝi. Kvankam malprave. Volapuko mortis pro siaj malperfektaĵoj; ĉi tiuj necesigis multajn plibonigojn kaj plisimpligojn kaj pro tiuj estiĝis malkonsentoj kaj malharmonio, kiuj fine estis la kaŭzoj de ĝia disfalo.



## II. ESPERANTO.

### 3. Deveno.

La aŭtoro de Esperanto estas d-ro L. L. Zamenhof. Li naskiĝis la 15-an de decembro 1859 en Bialystok (Polio), kaj mortis la 14-an de aprilo 1917 en Varŝavo.

Bialystok havis diversgentan kaj diverslingvan loĝantaron. Pro tio Zamenhof jam kiel infano povis konstati la malbonon de la lingvodiferenco. Tiu konstato influis lian pensadon kaj vekis ĉe li la ideon, ke estas necese enkonduki komunan lingvon, per kiu ĉiuj homoj povu interkompreniĝi.

Lernante en la gimnazio la antikvajn lingvojn, li opiniis, ke la Latino povus plenumi la rolon de tia komuna interkomprenilo. Poste li klopodis kunmeti artefaritan lingvon kun mallongaj arbitre elpensitaj vortoj, deklinacioj, ktp. Sed ankaŭ ĉi tiu vojo montriĝis netaŭga. Fine li komprenis, ke nur artefarita lingvo kun elementoj prenitaj el la plej gravaj naturaj lingvoj, estus la sole ĝusta solvo. Ĉi tiu ideo kaptis lin plene kaj li laboris por ĝi longe kaj persiste.

En 1878 — Zamenhof estis ankoraŭ gimnaziano — lia projekto de „lingve uniwersale” estis pli malpli preta. Post tio li dum kelkaj jaroj multe verkis kaj tradukis en ĝi. Per tio la lingvo pliperfektigis kaj akiris propran stilon kaj spiriton. En 1885 Zamenhof forlasis la universitaton kaj instalas sin kiel kuraciston. Tiam li klopodis publikigi sian projekton. Dum longa tempo li serĉis eldononton, sed vane. Nur en 1887 li sukcesis kun helpo de sia bopatro mem eldoni ĝin.



### 4. Strukturo.

Esperanto estas artefarita nur en tiu senco, ke ĝiaj elementoj estas arte kaj logike kunigitaj kaj ordigitaj. Sed ĉi tiuj elementoj mem estas preskaŭ tute naturaj, prenitaj el la ekzistantaj naciaj idiomoj. La vortmaterialo devenas plejparte (60%) el la lingvogrupo romana; ĉirkaŭ 30% de la vortoj estas germanaj, 10% estas slavaj.

La elekto de la vortoj okazis ĉefe laŭ la principo de internacieco. Zamenhof prenis el la plej gravaj lingvoj kiel eble plej multe tiujn vortojn, kiujn la plej granda kvanto da homoj povas kompreni sen antaŭa studo.

Gravan rolon ludas en Esperanto la afiksoj. Helpe de ĉi tiuj (10 prefiksoj kaj 28 sufiksoj) oni povas konstrui el malgranda nombro da radikoj grandegan kvanton da vortoj

aliaj. La afiksoj tre faciligas la lernadon de la lingvo, ĉar ili grave malpliigas la lernotan vortmaterialon.

La vortfarado en Esperanto okazas per kunmetado de diversaj vortelementoj: radikoj, afiksoj kaj finaĵoj. La elementoj, el kiuj konsistas iu kunmetita vorto, difinas la signifon de tiu kunmetitaĵo. Pro ĉi tiu eco Esperanto apartenas al la t.n. aglutinaj lingvoj. La aglutina karaktero de la lingvo tre faciligas la lernadon al tiuj popoloj, por kiuj la internacieco de la vortaro ne estas avantaĝo.



### 5. Fundamento.

La Fundamento de Esperanto estas verko de d-ro Zamenhof, konsistanta el: 16-regula gramatiko, universala vortaro kaj ekzercaro. Ĉi tiun Fundamenton akceptis la 1-a kongreso kaj poste la tuta esperantistaro kiel „netuŝeblan” bazon de la lingvo.

En la antaŭparolo al la Fundamento d-ro Zamenhof detale klarigis la celon de ĉi tiu verketo. Laŭ tiu antaŭparolo la Fundamento ne estas unualoke lernolibro kaj vortaro, sed antaŭ ĉio *leĝdonanto*. Ĝi servas por tio, ke ĉiu esperantisto sciu klare, kio en Esperanto estas oficiala kaj netuŝebla, por ke li ĉiam povu bone distingi la vortojn kaj regulojn *oficialajn*, kiuj devas troviĝi en ĉiuj lernoverkoj de Esperanto, de la vortoj kaj reguloj rekomendataj *private*.

Ekzistas unu kvinlingva eldono de la Fundamento kaj diversaj nacilingvaj. La vortojn troviĝantajn en la Fundamento oni nomas „oficialaj”. Ĝis nun aperis sub titolo „Aldono al Universala Vortaro” 4 listoj da vortoj oficialigitaj de la Akademio.



### 6. Evoluo.

D-ro Zamenhof skribis en la antaŭparolo al la Fundamento: „Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo ĉiam restos rigida kaj neniam disvolviĝos. . . . Ho ne! malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante *pliboniĝadi*, kaj *perfektiĝadi*; la netuŝebleco de la

fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektigado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga rompado kaj ŝanĝado, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo *natura*, senkonfuza kaj sendanĝera".

Esperanto do evoluas kaj pliperfektigas ne per subitaj ŝanĝoj aŭ per t.n. plibonigoj laŭ ies personaj gustoj aŭ per decidoj de iu instanco, sed same kiel naturaj lingvoj. Ĝi perfektigas kaj pliriĉigas nur iom post iom per enkonduko de novaj vortoj kaj novaj formoj kiel neologismoj, laŭ bezono de la praktiko kaj sen forigo de ĝistiamaj vortoj kaj formoj. Tiel malnovaj kaj novaj formoj estas uzataj paralele kaj tiuj novaĵoj, kiuj montriĝas utilaj iom post iom eniras la lingvon.



### 7. Deklaro.

La Unua Kongreso de Esperanto en 1905 akceptis laŭ propono de d-ro Zamenhof, t.n. Deklaron pri Esperantismo, kies ĉefa enhavo estas:

ke la Esperantismo estas la penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale-homa, kiu „ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn" donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj kaj ke ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la esperantismo estas lia afero pure privata, por kiu la esperantismo ne respondecas,

ke ĝis nun el ĉiuj projektoj de mondlingvo nur Esperanto estas sufiĉe elprovita kaj montriĝis sufiĉe taŭga kaj ke tial amikoj de lingvo internacia grupiĝis ĉirkaŭ tiu lingvo, ke la aŭtoro de Esperanto fordonis ĉiujn rajtojn pri la lingvo kaj ke do la tuta mondo estas la materiala mastro de la lingvo,

ke la Fundamento de Esperanto estas deviga por ĉiu esperantisto kaj ke neniu havas rajton fari en ĝi iujn ŝanĝojn, ke esperantisto estas ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas.



### 8. Instruado.

Ekzistas du metodoj de Esperanto-instruado: la gramatika, kiu lernigas la lingvon per la nacia lingvo kaj la t.n. „rekta metodo", kiu proprigas la lingvon al la lernantoj senpere, t.e. ne aŭ tre malmulte uzante nacian lingvon.

La malavantaĝo de la unua estas, ke per ĝi oni iom malfacile lernas flue paroli kaj ke ĝi estas iom seka, nealloga kaj fortimigas sufiĉe grandan parton de la lernantoj.

La rekta metodo akiris precipe en la lastaj jaroj multajn aprobantojn. Ĝiaj avantaĝoj estas, ke per ĝi oni tuj paroligas la lernantojn, kuraĝigas ilin kaj pliagrabiligas la lernadon. Malperfektaĵo ŝajnas, ke tiumetode oni malpli bone lernas la gramatikon.

Tute propran sistemon laŭ la rekta metodo, t.n. Cseh-metodon (Ĉe-metodon), ellaboris rumana pastro Andreo Cseh. Li kaj liaj lernintoj gvidis en kelkaj landoj amasajn kursojn laŭ ĉi tiu metodo kun granda sukceso.

Por bone organizi la Cseh-instruadon, por eduki kapablajn instruistojn, por interŝanĝi kursgvidantojn inter diversaj landoj ktp., stariĝis Internacia Cseh-Instituto de Esperanto en Hago. Ĝi havas propran ejon t.n. Esperanto-Domo en Arnhem, kie ĝi okazigas kursojn ktp. Plie ĝi eldonas monatan gazeton *La Praktiko*.



### III. ĜENERALA MOVADO.

#### 9. Ekdisvastiĝo.

La 26-an de julio 1887 aperis en Varŝava librejo verketo *Mezjdunarodnyj Jazyk* (Internacia Lingvo), de d-ro Esperanto kaj per tio la lingvo de Zamenhof eniris la mondon. La libreto estis en la rusa lingvo; en la sama jaro aperis ankaŭ eldonoj en pola, franca kaj germana lingvoj.

La aŭtoro sendis sian verketon al multaj gazetoj, revuoj, institucioj, scienculoj ktp. Li ricevis kelkajn aprobojn, sed pli da moko. Tamen iuj lernis la lingvon kaj interrilatis kun d-ro Zamenhof. Tiel estiĝis la unuaj esperantistoj, ĉefe rusoj kaj poloj.

El ĉi tiuj unuaj adeptoj ni devas nomi: Borovko, Devjatnin, Gernet, Grabovski, Kofman, Ostrovski, Poŝtnikov, Wasniewski (Vaŝnivski).

Poste la lingvo ekdisvastiĝis en Germanio. Gravan pioniran laboron faris tie L. Einstein (Ajnstajn), Ch. Schmidt (Ŝmit) kaj W. H. Trompeter. La unua verkis artikolojn kaj broŝurojn pri la lingvo. Schmidt varbis al Esperanto la Nurnbergan Mondlingvan Unuiĝon (volapukan), tiel ke ĝi transformiĝis en (la unuan!) Esperanto-grupon (1888). En Nurnbergo ankaŭ aperis la unua Esperanto-gazeto *La Esperantisto* (1889). Kiam poste la morto minacis ĉi tiun gazeton, Trompeter savis ĝin per malavara monhelpo kaj ebligis ĝian pluan aperon.

En 1890-1894 venis multaj reformproponoj. Ĉi tio malhelpis la disvastiĝon de la lingvo. En 1893 stariĝis laŭ propono de d-ro Zamenhof Tutmonda Ligo Esperantista, konsistanta el abonantoj de *La Esperantisto*. Unu jaron poste okazis voĉdonado pri reformproponoj inter la membroj de la Ligo, el kiu montriĝis, ke la plimulto el la esperantistoj deziris, ke la lingvo restu tia, kia ĝi estas.

En 1895 la rusa cenzuro malpermesis la eniron de *La Esperantisto* en Rusion, ĉar ĝi publikigis artikolon de Leo Tolstoj. Ĉar la plimulto el ĝia abonantaro loĝis en Rusio, ĉi tio signifis la morton de la gazeto. Sed en la sama jaro nova gazeto *Lingvo Internacia*, eldonata de esperantistoj en Upsala (Svedio) kaj redaktata de Paul Nylen anstataŭis ĝin. Ĉefa pioniro de Esperanto en Francio estis L. de Beaufront (Bofron). Li verkis kaj eldonis diversajn lernilojn kaj propagandilojn kaj kreis la gazeton *L'Esperantiste* (Esperan-

tisto). Aliĝis al Esperanto Boirac (Buarak) p-ro Bourlet (Burle), G. Chavet (Ŝave), Fruictier (Fruktje), d-ro Javal (Javal), p-ro Cart (Kar), G. Moch (Moĉ), Peltier (Peltje), Generalo Sebert (Seber) k. a. Mondkonata firmao Hachette & Cie (Aŝet e Si) komencis la eldonadon de esperanta literaturo.

De tiam (ĉ. 1900-05) fakte komenciĝis la movado. En Britio propagandis Bolinbroke Mudie (Bolinbruk Mjudi), Ĉefeĉ, J. Rhodes (Rodz), Wackrill (Vokril) k. a., en Germanio, J. Borel, Christaller (Kristaler), L. E. Meijer (Majer), d-ro Mybs (Mibs) kaj A. Schmidt (Ŝmit). Ankaŭ en multaj aliaj landoj fervoraj pioniroj eklaboris por la afero.

★

#### 10. Kongresoj.

En aŭgusto 1905 okazis en Bulonjo ĉe maro (Boulogne sur Mer) la unua Universala Kongreso de Esperanto. Estis preskaŭ 700 partoprenantoj, kiuj kun granda entuziasmo konstatis, ke ankaŭ por parola uzo la lingvo bonege taŭgas. D-ro Zamenhof faris la malferman paroladon. Lia sento kaj tiuj de la kongresanoj estas belvorte esprimitaj en jena fragmento el lia parolado:

„...Sankta estas por ni la hodiaŭ tago. Modesta estas nia kunveno; la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi, kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo; ne kunvenis regnestroj, nek ministroj, por ŝanĝi la politikan karton de la mondo, ne brilas luksaj vestoj kaj multego da imponantaj ordenoj en nia salono, ne bruas pafilegoj ĉirkaŭ la modesta domo, en kiu ni troviĝas; sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema: ĝi estas la sonoj de io granda, kiu nun naskiĝas. Tra la aero flugas misteraj fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas; ili estas imagoj de tempo estonta, de tempo tute nova. La fantomoj flugos en la mondon, korpigiĝos kaj potenciĝos, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos...”

Post ĉi tiu kongreso oni kunvenis regule ĉiujare krom en la jaroj 1914-1919. Ĉis 1913 d-ro Zamenhof faris en ĉiu kongreso malferman paroladon. La 10-a kongreso en Parizo, por kiu sin enskribigis preskaŭ 4000 partoprenantoj, pro la eksplodo de la mondmilito ne okazis. Pri loko kaj dato de la kongresoj kaj nombro da aliĝintoj informos ĉi kuna tabelo.

Sekva numero	Loko	Jaro	Nombro da aliĝintoj	Nombro da landoj reprezentitaj
1-a	Bulonjo ĉe Maro .....	1905	688	20
2-a	Genevo .....	1906	818	30
3-a	Kemбриго (Cambridge) ..	1907	1317	35
4-a	Dresdeno .....	1908	1368	40
5-a	Barcelono .....	1909	1287	32
6-a	Vaŝingtono .....	1910	357	20
7-a	Antverpeno .....	1911	1733	42
8-a	Krakovo .....	1912	946	28
9-a	Berno .....	1913	1015	30
10-a	Parizo (ne okazis) .....	1914	3739	50
11-a	San Francisko .....	1915	163	16
12-a	Hago .....	1920	408	27
13-a	Praha .....	1921	2561	35
14-a	Helsinki .....	1922	820	30
15-a	Nurnbergo .....	1923	4963	43
16-a	Vieno .....	1924	3400	40
17-a	Genevo .....	1925	935	35
18-a	Edinburgo .....	1926	960	36
19-a	Dancigo .....	1927	905	35
20-a	Antverpeno .....	1928	1494	36
21-a	Budapesto .....	1929	1256	33
22-a	Oksfordo .....	1930	1200	30
23-a	Krakovo .....	1931	713	30
24-a	Parizo .....	1932	1600	?
25-a	Kolonjo .....	1933 <sup>1)</sup>	1000	32
26-a	Stokholmo .....	1934	2000	34
27-a	Romo .....	1935	1500	37
28-a	Vieno .....	1936	1100	

Oni devas atenti pri tio, ke la nombro da aliĝintoj ĉiam multe superis la nombron da efektivaj kongresanoj-esperantistoj.

En multaj kongresoj la ĉefa temo estis la organiza problemo. Ŝajnas, ke la ĝusta organiza formo por la esperanto-movado ankoraŭ ne estas trovita.

Post 1927 oni aranĝis, por aldoni ion seriozan al la kongreso t.n. Someran Universitaton, konsistantan el lekcionoj pri popular-sciencaj temoj. Komence ĉi tiu aranĝo sukcesis, sed lasttempe oni jam aludis, ke oni devas plibonigi ĉi tiun institucion aŭ forigi ĝin.

<sup>1)</sup> De 1933 ni nomas la nombron ne de aliĝintoj, sed de la partoprenantoj.

## 11. Centra Oficejo.

La Centra Oficejo estis duonoficiala institucio iniciatita kaj starigita de Generalo Sebert k. a. Ĝi estis financata komence de li mem kaj kelkaj malavaraĵoj esperantistoj kaj poste de la Societo de Amikoj de Esperanto.

La Centra Oficejo helpis al la ĝenerala propagando, servis kiel arkivejo kaj biblioteko kaj kiel sidejo de la Lingva Komitato (LK) kaj la Akademio.

Ĝi aperigis raportojn pri ĉiuj kongresoj, oficialajn dokumentojn kaj Oficialan Gazeton (1909-1914), kiu servis kiel organo de la LK kaj la Akademio. En Oficiala Gazeto aperis i.a. raportoj kaj decidoj de la oficialaj institucioj de la movado, informoj pri la movado ktp. Post 1922 la CO likvidiĝis.



## 12. Lingva Komitato kaj Akademio.

La LK estis fondata en la kongreso de Bulonjo en 1905. Ĝia tasko estas, laŭ la regularo aprobita en 1912: „zorgi pri la konservado de la principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evoluon”.

La nombro da LK-anoj estas nelimitita. Ĝi nun konsistas el 129 membroj, kiuj reprezentas 26 diversajn lingvojn.

La LK mem elektas siajn membrojn, sed la naciaj kaj fakaj asocioj povas proponi kandidatojn.

La LK elektas el tiuj membroj, kiuj havas specialan lingvan kompetenton kaj kiuj havas la eblon doni efikan partoprenon en la laboroj de la Komitato superan komisionon, nomatan Akademio. Ĝi konsistas el ne pli ol 18 membroj.

Ekzistas apartaj sekcioj el Akademianoj por „Komuna Vortaro” kaj por „Gramatiko”.

Oficialaj organoj de la LK kaj la Akademio estas la Oficiala Bulteno de la Esperantista Akademio aperanta laŭbezzone kaj la Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio. En Deklaro de la Akademio (decembro 1920) la taskoj de ambaŭ institucioj estas formulitaj jene: „La Lingva Komitato kaj ĝia Akademio ne havas la rajton iniciati iun ŝanĝon, korekton aŭ aldonon, nek krei novajn vortojn; ili devas nur konstati, kontroli, elekti, konsili, rekomendi aŭ malrekomendi: ili estas nur ordigiloj, moderigiloj kaj reguliloj, kiuj celas konservi la necesan unuecon kaj harmonion”.





### **13. Kontrakto de Helsinki kaj la Internacia Centra Komitato (ICK).**

En la lastaj jaroj antaŭ la milito la organiza problemo estis aktuala diskutpunkto ĉe la esperantistaro. Jam ekzistis tiutempe multaj diversaj organizoj, sed mankis iu centro, kiu kunligis ĉi tiujn organizojn kaj reprezentis la tutan movadon. Nek UEA (§ 16), nek la tiam ekzistanta Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Societoj povis plenumi tiun rolon.

Post la restariĝo de la movado en 1918-1919 ĉi tiu problemoj tuj ree okupis la unuan lokon. En la kongreso de Hago 1920 oni elektis komisionon por studi la demandojn kaj serĉi solvon. Nur fine en 1922 estiĝis interkonsento inter la gvidantoj de la du organizaj tendencoj en la movado. La 14-a kongreso samjare konfirmis ĉi tiun interkonsenton, kiu nomiĝis la Kontrakto de Helsinki.

Laŭ ĉi tiu kontrakto la neŭtrala esperanta movado estis organizita jene: Po unu reprezentanto de la naciaj societoj formis la Konstantan Reprezentantaron (KR). Ĉi tiu KR kaj la Komitato de UEA elektis kune sesmembran Internacian Centran Komitaton (ICK), kiu funkciis kiel gvida centro de la movado.

La ICK eldonis Internacian Esperanto-Servon (IES-novaĵoj por propagando), starigis komisionojn por specialaj laboroj (radio, gazetaro, statistiko), okazigis konferencojn (komerco kaj turismo en 1923, komerco kaj trafiko en 1929 k.a.) kaj reprezentis la movadon ĉe propagandaj klopodoj en oficialaj aŭ aliaj rondo. Ĝi ankaŭ organizis propagandan mondvojaĝon de s-ro Scherer (Ŝerer). La financoj de la ICK konsistis el kotizoj de landaj asocioj, de kongresoj kaj el subvencio de UEA. Ĝia oficejo estis en Genevo.

La kontrakto de Helsinki daŭris 10 jarojn. Ĝi neniam kontentigis la tutan esperantistaron kaj de 1928 oni ree parolis en la kongresoj pri la organiza problemo. Ĝis fine en 1932, kiam UEA ne plu povis pagi al ICK la kutiman jaran subvencion, la KR, kunveninte ĉe la kongreso en Parizo, decidis nuligi la kontrakton. Oni elektis komitaton por projekti alian organizformon, kiu ebligis al la esperantistoj organizi sin internacie pere de la naciaj societoj.

Ĉi tiu komitato publikigis en 1932 projekton de tute nova organizo, kiu eĉ anstataŭis la UEA-on. Sed ĉi tiu projekto ne realiĝis. Oni trovis alian solvon, kiu estas konata sub la nomo „Interkonsento de Kolonjo”.

★

### **14. Interkonsento de Kolonjo.**

En la 25-a Universala Kongreso de Esperanto en 1933 oni akceptis la *Interkonsenton de Kolonjo*, kies ĉefa enhavo estas la jena:

UEA estas la tutmonda organizo esperantista, kiu reprezentas la esperanto-movadon kaj organizas la universalajn kongresojn.

Neŭtralaj landaj asocioj, kiuj havas almenaŭ 100 membrojn, povas aliĝi sian membraron al UEA. Kiam ili pagas por ĉiuj siaj membroj la por tio fiksitajn kotizojn, ĉi tiuj iĝos aŭtomate simplaj membroj de UEA, kiuj ricevas membrokartojn kaj rajtas uzi la servojn de la delegitoj pri vojaĝhelpo kaj informpetado. Por tiuj membroj, kiuj deziras ricevi ankaŭ la jarlibron de UEA, aŭ la jarlibron kaj gazeton (aktivaj membroj) la landa asocio pagas al UEA aldonajn kotizojn.

En landoj, kie la landa asocio aliĝas siajn membrojn al UEA, oni povas aliĝi ankaŭ senpere al UEA, pagante kotizon pli altan ol tiu, kiun pagas la landa asocio.

La landaj asocioj prizorgas la administradon de la membroj de UEA en sia lando kaj elektas interkonsente kun UEA la ĉefdelegiton. Ili elektas ankaŭ la lokajn delegitojn kun konsento de la ĉefdelegito.

Fakaj asocioj, institucioj, ktp. povas enskribigi sin kiel partoprenantojn en la ĝenerala movado kontraŭ pago de fiksitaj kotizoj.

Funkcios *Konsilantaro de la esperanto-movado*, konsistanta el komitatoj de UEA kaj reprezentantoj de aliĝintaj asocioj kun pli ol 200 membroj, ĉefdelegitoj, honoraj membroj, dumvivaj membroj, patronoj kaj reprezentantoj de asocioj kaj institucioj registritaj kiel partoprenantoj en la esperanto-movado; ĝi kunsidas ĉe ĉiu universala kongreso, pritraktas raportojn, proponojn, ktp. kaj esprimas siajn dezirojn al la Komitato de UEA.

La Internacia Komitato de UEA konsistas el: a) komitatoj elektitaj de la aliĝintaj landaj asocioj; b) komitatanoj elektitaj de la lokaj delegitoj en landoj, kie ne estas aliĝinta landa asocio; c) komitatanoj elektitaj de la komitatoj nomitaj sub a) kaj b). La kvanto de la sub c) komitatoj estas triono de la sub a) kaj b) nomitaj.

★

## 15. Organizoj.

Por la propagando de Esperanto zorgas ĉefe la lokaj grupoj kaj la naciaj asocioj. La grupoj faras propagandon sur loka kampo, starigas kursojn, okazigas kunvenojn por pliperfektigi siajn membrojn ktp. En multaj landoj la lokaj grupoj unuiĝas en nacia asocio. Ĉi tiuj naciaj asocioj propagandas laŭ tutlanda skalo, eldonas propagandilojn, lernilojn, ktp. Generale ili publikigas nacian gazeton, dulingvan kun propagandaj artikoloj, oficialaj informoj, ekzercaparto ktp.

Tiel ekzistas en Britio la Brita Esperanto Asocio kun sia organo Brita Esperantisto, en Francio la Societo Franca por propagando de Esperanto, kies organo estas Franca Esperantisto, en Germanio la Germana Esperanto-Asocio, kiu eldonas Germanan Esperantiston.<sup>1)</sup> Same estas en Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Bulgario kaj preskaŭ ĉiuj aliaj landoj.

En diversaj landoj troviĝas krom ĉi tiuj neŭtralaj grupoj kaj asocioj, apartaj organizoj de katolikaj kaj de laboristaj esperantistoj.

Ekzistas ankaŭ organizoj, kiuj celas ne la propagandon, sed la aplikon, la uzadon, la praktikan utiligon de la lingvo.

El la neŭtralaj asocioj por apliko de Esperanto plej grava estas UEA, pri kiu ni informas en § 16.

Katolika organizo tiuspeca estas la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), fondita en 1910. Ĝi celas servi la interesojn de la katolikismo kaj de la katolikaro per Esperanto. Al ĝi povas aliĝi naciaj asocioj kaj individuaj membroj. Ĝi eldonas monatan revuon Katolika Espero kaj aperigas ankaŭ jarlibron. Ĉiujare ĝi okazigas katolikan kongreson.

Kelkaj aliaj estas:

Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE), Internacia Ligo de Esperantista Poŝt- kaj Telegraf-Oficistaro (ILEPTO), Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA), Internacia Scienca Asocio Esperantista, Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj, Tutmonda Esperanto-Junulara Asocio, Skolta Esperantista Ligo, Teozofia Esperanta Ligo, Vegetara Ligo Esperantista, Kristana Esperantista Ligo. Pri laboristaj organizoj vidu § 20 ĝis 50.

<sup>1)</sup> De 1936 estas en Germanio la Esperanto-movado malpermesita.



## 16. Universala Esperanto-Asocio.

La Universala Esperanto-Asocio estas fondita en 1908 laŭ iniciato de H. Hodler kaj Th. Rousseau (Ruso). Ĝiajn fondintojn instigis la ideo, ke ne sufiĉas nur propagandi la lingvon, sed ke estas necese organizi la uzadon, la utiligadon de Esperanto por enradikigi ĝin en la praktika vivo.

Laŭ sia statuto UEA celas: 1. plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco de nacieco, raso aŭ lingvo; 2. kreskigi inter siaj membroj fortan senton de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon de fremdaj popoloj; 3. disvastigi la uzadon de la lingvo Esperanto; 4. krei internaciajn servojn uzablajn de ĉiuj homoj kaj entreprenoj, kies intereso celas trans la limoj de ilia genta aŭ lingva teritorio.

Por atingi ĉi tiun celon UEA kreis sistemon de reciproka servado plenumata de delegitoj elektitaj en kiel eble plej diversaj lokoj de la mondo. Ĉi tiuj delegitoj havas la taskon: 1. helpi laŭpove kaj ĉiumaniere travojaĝantaj UEA-anojn; 2. doni al la membroj de UEA informojn pri vojaĝado, komerco, kaj ĉiuj aliaj aferoj. Ĉi tiuj servoj devas esti farataj sen rekompenco, nur eventualajn elspezojn necesajn paŝu la petinto. Por ebligi al la membraro interrilati kun tiuj delegitoj UEA aperigas Jarlibron, kiu enhavas krom aliaj sciindaĵoj kompletan adresaron de ĉiuj delegitoj. Plie aperas monata organo Esperanto, kiu servas kiel informilo kaj ligilo kaj samtempe propagandas la ideojn de UEA.

En 1914 UEA jam havis pli ol 7000 membrojn. La nombro da servoj faritaj en la jaroj 1909-1913 estis pli ol 45000. Kompreneble ĉi tiuj servoj ne estis ĉiuj same gravaj, certe estis inter ili ankaŭ bagatelaj, sed ĉi tiuj nombroj tamen montras, ke la servoj estis bezonataj kaj uzataj.

La unua kongreso de UEA okazis en 1910 en Augsburg; poste ĝiaj kongresoj ĉiam okazis kune kun la Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Interne en UEA ekzistis ĝis 1914 Fakoj Interŝanĝa, Laborista kaj Studenta, sed ili ne bone prosperis. Plie estis interkonsento inter UEA kaj naciaj societoj, laŭ kiu ĉi tiuj povis elekti reprezentanton en UEA kaj tiel partopreni ties agadon. La brita, franca, germana kaj kelkaj aliaj neŭtralaj naciaj asocioj subskribis ĉi tiun interkonsenton.

La milito, kiu interrompis la regulan evoluon de la movado, ankaŭ ege malhelpis al UEA. Sed ĉar ĝia centro troviĝis sur neŭtrala teritorio, ĝi povis resti funkcia kaj ĝi klopodis konservi la kontakton kaj interligon inter diverslandaj esperantistoj. Ĝia organo Esperanto, ĉesigita en aŭgusto 1914, reaperis en januaro 1915.

Ĉar UEA ne plu povis plenumi siajn kutimajn taskojn, ĝi klopodis servi alimaniere. Ĝi peradis la intersanĝon de mono kaj leteroj inter personoj en „malamikaj” landoj, ĉefe por neesperantistoj. Homoj, kiuj havis parencojn, amikojn aŭ konatojn en lando, kiu militis kontraŭ ilia nacio, povis per helpo de UEA interrilati kun ili. Necesis nur sendi la leterojn al UEA, kiu laŭ bezono tradukis ilin en la lingvon de la lando de destino kaj forsendis. Krome funkciis per helpo de delegitoj servo de serĉado de malaperintaj civiluloj, kiu havis bonajn rezultojn. Centoj da dankleteroj alvenis.

Post la milito UEA baldaŭ rekomencis sian kutiman agadon. En 1919 ĝi eldonis Adresaron de delegitoj. En 1920 denove eliris la Oficiala Jarlibro.

Samjare UEA perdis sian fondinton, la klarvidan kaj noblan gvidanton H. Hodler. Lia morto estis por UEA granda perdo. E. Privat (Priva) kaj Stetler transprenis lian taskon kaj pluen gvidis la asocion. En 1924 Hans Jakob iĝis direktoro de UEA.

En la jaroj 1920-1921 oni multe klopodis ĉe la Ligo de Nacioj. Rezulto de tiu laboro estas la Raporto de la L. d. N. pri Esperanto, grava dokumento ekster-esperantista pri nia movado.

Per la Kontrakto de Helsinki UEA iĝis oficiala institucio de la neŭtrala movado. De tiam ĝia Jarlibro estis Oficiala Jarlibro de la Esperanto-Movado (§ 13).

La membronombro de UEA, kiu estis en 1920 ĉ. 4000, de tiam regule kreskis. En la jaroj 1927-1930 la asocio havis ĉ. 9000 membrojn. La nombro da delegitoj estis ĉ. 2000. Sed post 1930 venis malprogreso. De tiu tempo la membraro ĉiujare malpliĝis. Ĉi tio kompreneble influis la financojn. Krome ankaŭ la mastrumo de UEA estis sufiĉe multekosta. Pro tio en la lastaj jaroj, la budĝeto ĉiam montris deficitajn. Komence oni forigis ilin per la kapitalo, kiun H. Hodler testamentis al UEA, sed kiam ankaŭ ĉi tiu sumo estis foruzita, minacis bankroto.

En la kongreso en Stokholmo (1934) oni multe diskutis pri tio kaj tre kritikis la agojn de la estraro. Ĉe la baloto de la estraro oni ne reelektis kelkajn gravajn funkciulojn, inter kiuj ankaŭ estis E. Privat. Sekve de tio la prezidanto E. Stettler kaj la direktoro H. Jakob rezignis pri siaj funkcioj. Oni elektis alian estraron, kies prezidanto iĝis generalo L. Bastien en Parizo; direktoro iĝis R. Kreuz.<sup>1)</sup>

Kvankam la nova estraro por ekvilibrigi la budĝeton entreprenis gravajn ŝparigajn aranĝojn, ĝi tamen ne tute sukcesis. La financa situacio restis minaca. Finfine oni decidis en 1936 por savi la asocion translokigi la sidejon al Londono, kie la mastrumaj elspezoj estus 50% malpli ol en Genevo. La bibliotekon oni decidis transdoni al la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Ĉi tiuj decidoj havis tamen gravajn konsekvencojn. La statuto de UEA ne permesas translokigon de la sidejo en alian landon. Kelkaj svisaj UEA-anoj faris ĉe la tribunalo proteston kontraŭ la decido de la estraro kaj atingis, ke la transporto de la materialo estis malpermesata. La estraro multe klopodis por atingi interkonsenton kun la protestintoj, sed ne sukcesis. Pro tio oni fine decidis la 15-an de aŭgusto 1936 fondi novan organizon sub la nomo *Internacia Esperanto-Ligo*<sup>2)</sup>

Kio estos la sekvo de ĉi tiu decido, kiel plue evoluos la aferoj, estas nun ankoraŭ ne direble.<sup>3)</sup>

<sup>1)</sup> R. Kreuz mortis en 1936, lian funkcion transprenis C. C. Goldsmith.

<sup>2)</sup> Oficialaj organoj de IEL estas nun La Heroldo de Esperanto kaj Esperanto Internacia.

<sup>3)</sup> De alia flanko oni klopodos plue funkciigi la UEA-on.



## 17. Literaturo.

La unua kaj plej modela esperanta aŭtoro estis d-ro Zamenhof mem. Li verkis la poemojn *La Espero*, *La Vojo*, *Al la fratoj*, *Mia penso kaj Preĝo sub la verda standardo*, la konatajn kongresparoladojn kaj multe da artikoloj en *La Esperantisto* kaj aliaj gazetoj. Li tradukis:

H. C. Andersen, *Fabeloj*.  
Ch. Dickens, *La batalo de l' vivo*.  
W. v. Goethe, *Ifengio en Taŭrido*.  
N. V. Gogol, *La revizoro*.  
H. Heine, *La rabeno de Baharaĥ*.  
Moliere, *George Dandin*.  
E. Orzesko, *Marta*.  
F. Schiller, *La rabistoj*.  
W. Shakespeare, *Hamleto*.

Krom ĉi tiujn d-ro Zamenhof esperantigis ankaŭ la *Malnovan Testamenton*, kolekton da proverboj eldonita kiel *Esperanta Proverbaro* kaj parton de *Fundamenta Krestomatio*. Liaj lingvaj konsiloj aperis sub la titolo *Lingvaj Respondoj*.

La duan lokon okupis d-ro K. Bein (pseŭdonime: Kabe) kaj A. Grabovski. La unua tradukis i. a.:  
B. Prus, *La Faraono* (3 volumoj) kaj I. S. Turgenjev, *Patroj kaj filoj*.

Li estas ankaŭ la aŭtoro de la *Vortaro de Esperanto*, la unua vortaro kun esperantlingvaj difinoj.

A. Grabovski estas konata pro siaj originalaj kaj tradukitaj poemoj, aperintaj sub la titolo *El la parnaso de la popoloj* kaj pro sia traduko de la pola epopeo *Sinjoro Tadeo* de A. Mickiewicz.

En la jaroj antaŭ la milito la esperanta literaturo estis malgranda. Krom la jam nomitaj estis ankoraŭ kelkaj gravaj originalaj kaj tradukitaj verkoj.<sup>1)</sup> Nur en la postmilita epoko la literaturo grave kreskis. Nuntempe ĝi konsistas el kelkaj miloj da verkoj, originalaj kaj tradukitaj; ĉiuj lingvoj de la kultura mondo kaj ĉiuj kampoj de la homa spirito estas en ĝi reprezentitaj.

La pli granda parto de la esperanto-literaturo konsistas el verkoj beletristikaj; inter ili la tradukaĵoj okupas, laŭ kvanto, la unuan lokon. Jen sekvas la plej gravaj:

<sup>1)</sup> En sekvonta listo ili estas markitaj per steleto \*

El angla lingvo:  
H. Rider Haggard,  
Jack London,  
O. Schreiner,  
W. Shakespeare,  
Upton Sinclair,

"  
M. Wagnals,  
H. G. Wells,

El ĉeĥa lingvo:  
K. Čapek,  
J. Hašek,

El fina lingvo:  
A. Kivi,  
J. Linnankoski,

El flandra lingvo:  
H. Conscience,  
F. Timmermans,

El franca lingvo:  
About,  
Beaumarchais,  
H. de Balzac,  
Voltaire,  
Moliere,

El germana lingvo:  
H. Heine,  
F. Hebbel,  
G. E. Lessing,  
E. M. Remarque,

"  
B. von Suttner,

El greka lingvo:  
Homero,

*Luno de Israel*.  
*La Fera Kalkanumo*.  
*Romano pri Afrika Bieno*.  
*Sonĝo de Someromeza Nokto*.  
*Jimmy Higgins*.  
*Petrolo*.  
*Palaco de Danĝero*.  
*La dormanto vekigās*.

*Rossumaj Universalaj Robotoj*.  
*Travivaĵoj de la brava soldato*  
*Švejk*.

*La botistoj*.  
*Batalo pri la domo Heikkilä*.

*La Leono de Flandrujo*.  
*Pallieter*.

*La reĝo de la montoj*\*.  
*Edziĝo de Figaro*.  
*La firmo de la kato, kiu pilkludas*.  
*Kandid*.  
*La avarulo*.

*Atta Troll*.  
*Gyges kaj lia ringo*.  
*Natan, la saĝulo*.  
*El Okcidento Nenio Nova*.  
*La Vojo Returne*.  
*For la batalilojn!*\*

*Odussesias*.

El hispana lingvo: V. Blasco, Calderon,	<i>Sango kaj sablo.</i> <i>La urbestro de Zalamea.</i>
El hungara lingvo: F. Karinty, E. Madach, Petofi,	<i>La Cikonikalifo.</i> <i>La Tragedio de l' homo.</i> <i>Johano, la Brava.</i>
El itala lingvo: Dante,	<i>La Infero.</i>
El japana lingvo: T. Arišima, Išihara,	<i>Deklaracio.</i> <i>Verda Karto.</i>
El kroata lingvo: M. Jelusiĉ, I. Majuraniĉ,	<i>Cezaro.</i> <i>La morto de Smail-Aga Ĉengijiĉ.</i>
El latina lingvo: Virgilio,	<i>Eneido.*</i>
El nederlanda lingvo: I. Boudier Bakker, F. van Eeden, Hildebrand, Limburg Brouwer, J. van den Vondel,	<i>Surprizoj.</i> <i>La malgranda Johano.</i> <i>Camera Obscura. (Fragm.)</i> <i>Akbar.</i> <i>Gijsbreght van Aemstel.</i>
El norvega lingvo: H. Ibsen,	<i>Imperiestro kaj Galileano.</i>
El pola lingvo: H. Sienkewicz,	<i>Quo Vadis?</i>
El rusa lingvo: A. Bogdanow, D. Furmanow, A. S. Puŝkin, " " A. Tolŝtoj, " "	<i>Ruĝa Stelo.</i> <i>Ĉapajev.</i> <i>Kapitanfilino.</i> <i>Eugeno Onegin.</i> <i>Aelito.</i> <i>Princo Serebrjani.*</i>

El sveda lingvo: S. Lagerlof, A. Strindberg,	<i>Gösta Berling.</i> <i>Insulo de Feliculoj.</i>
--	--

Menciindaj estas ankoraŭ la diversnaciaj *Antologioj*, kiuj enhavas karakterizajn fragmentojn de la plej gravaj verkistoj de la koncerna nacio. Ĝis nun aperis *belga, bulgara, ĉeĥoslovaka, estona, hungara, kataluna kaj sveda Antologioj*.

La ĉefaj originalaj romanoj, noveloj ktp estas la jenaj:

Argus (F. Ellersiek), J. Baghy, " " " " H. J. Bulthuis, " " " " S. Engholm, " " H. A. Luijken, " " " " R. Schwartz, " " Tagulo (H. Hyams), Vallienne, " " V. Varankin, H. Weinhengst,	<i>Pro kio?</i> <i>Hura!</i> <i>Printempo en aŭtuno.</i> <i>Viktimoj.</i> <i>Sur sanga tero.</i> <i>Idoj de Orfeo.</i> <i>Jozefo kaj la edzino de Potifar.</i> <i>La vila mano.</i> <i>Homoj sur tero.</i> <i>Al Torento.</i> <i>Paŭlo Debenham.*</i> <i>Mirinda amo.*</i> <i>Stranga heredaĵo.</i> <i>Pro Iŝtar.</i> <i>Anni kaj Montmartre.</i> <i>Prozo ridetanta.</i> <i>Nova Sento.</i> <i>Kastelo de Prelongo.*</i> <i>Ĉu li?*</i> <i>Metropoliteno.</i> <i>Turstrato 4.</i>
---	--

Originalaj poemaroj estas:

J. Baghy, " " " " N. Hohlov, K. Kalocsay, E. Miĥalski, E. Privat, Diversaj aŭtoroj,	<i>Preter la vivo.</i> <i>Pilgrimo.</i> <i>La vagabondo kantas.</i> <i>La tajdo.</i> <i>Streĉita Kordo.</i> <i>Prologo.</i> <i>Tra la silento.</i> <i>Dekdu Poetoj.</i>
--	--

Pri scienco, tekniko, arto, politiko kaj filozofio temas jenaj verkoj:

originalaj:

E. Aisberg,	<i>Fine mi komprenas la radion!</i>
Ch. Bauouin,	<i>La arto de memdisciplino.</i>
W. E. Collinson,	<i>La homa lingvo.</i>
H. Haefker,	<i>Jarmiloj pasis (mondhistorio).</i>
J. R. G. Isbrucker,	<i>La evoluo de la telefonio.</i>
E. Lanti,	<i>Rembrandt, la magiisto.</i>
M. Muller,	<i>La rasoj de la mondo.</i>
R. Nordenstreng,	<i>Grekaĵoj Papirusoj.</i>
J. Penndorf,	<i>Naciismo, deveno, evoluo kaj sekvoj.</i>

tradukitaj:

P. Gille,	<i>Filozofio pri la homa digno.</i>
A. Hekler,	<i>Arthistorio.</i>
A. Honnorat,	<i>La sendanĝereco de Francio.</i>
A. Keith,	<i>La origino de la homo.</i>
P. Kropotkin,	<i>Etiko.</i>
F. Nitti,	<i>Eŭropo ĉe la abismo.</i>
Smogorzewski,	<i>Pol-Pomeranio.</i>

Priskriboj pri landoj, popoloj kaj moroj, pri vojaĝoj kaj ekspedicioj ne mankas en la esperanta literaturo:

originalaj:

Delsudo & Lauri Laiho,	<i>Aŭstralio, lando kaj popolo.</i>
Krestanov,	<i>Bulgara lando kaj popolo.</i>
J. Scherer,	<i>Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo.</i>
L. Sinha,	<i>Hindo rigardas Svedlandon.</i>

tradukitaj:

Andree,	<i>Per balono al la poluso.</i>
S. Bergman,	<i>Tra sovaĝa Kamĉatko.</i>
J. Wezl,	<i>Tridek jarojn en la ora nordo.</i>

Kelkaj religiaj verkoj (tradukitoj) estas:

Bunyan,	<i>La Sankta Biblio.</i>
C. Dickens,	<i>La progresado de la pilgrimanto.*</i>
G. Papini,	<i>La vivo de nia sinjoro Jesuo.</i>
Stephan,	<i>Historio de Kristo.</i>
	<i>Fundamentoj de Kvakerismo.</i>

Aperis ankaŭ multaj verkoj pri lingvo kaj movado. La ĉefaj el ili estas, krom tiuj de Zamenhof kaj Kabe jam nomitaj:

E. Boirac,	<i>Plena Vortaro de Esperanto.*</i>
E. Drezen,	<i>Analiza Historio de la Esperanto-movado.</i>
"	<i>Historio de la mondlingvo.</i>
Fruictier-Grenkamp,	<i>Kompleta Gramatiko kaj Vortaro de Esperanto.<sup>1)</sup></i>
Grosjean Maupin k. a.	<i>Plena Vortaro de Esperanto.</i>
Kalocsay & Waringhien,	<i>Plena Gramatiko de Esperanto.</i>
E. Privat,	<i>Parnasa Gvidlibro.</i>
"	<i>Historio de Esperanto. (2 volumoj)</i>
Ŝirjaev, Bleier & Kokeny,	<i>Vivo de Zamenhof.</i>
P. Stojan,	<i>Enciklopedio de Esperanto. (2 vol.)</i>
Verax,	<i>Bibliografio de Internacia Lingvo.</i>
E. Wüster,	<i>Enciklopedia Vortaro Esperanta.*</i>
E. Zakrzewski,	<i>Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana. (ĝis litero K.)</i>
L. Zamenhof,	<i>Historio de Esperanto.*</i>
	<i>Originala Verkaro.</i>

<sup>1)</sup> La unua eldono, de Fruictier sola, jam aperis en 2 apartaj libretoj, antaŭ la milito.



### 18. Internacia Gazetaro.

La gazetoj La Esperantisto, Lingvo Internacia, Oficiala Gazeto kaj Esperanto (de UEA) estas jam nomitaj en § 9, 11 kaj 16.

Tre grava organo estis La Revuo, eldonita de la Fermo Hachette & Cie en Parizo en 1906-14 kaj redaktata de P. Bourlet. Ĝia enhavo estis precipe literatura; kunlaboris en ĝi d-ro Zamenhof kaj aliaj eminentaj esperantistoj. Ankaŭ Internacia Scienca Revuo (poste Scienca Gazeto), eldonita de la Internacia Scienca Asocio Esperantista en 1904-14 meritas mencion. Kelkaj aliaj gazetoj aperintaj en la periodo ĝis 1914 estas: Esperanto-Ligilo (brajla gazeto por blinduloj), Espero Pacifista, Dia Regno, Fervoja Esperantisto, Internacia Socia Revuo, Juna Esperantisto, Tra la mondo, Universo, Voĉo de Kuracistoj.

Ĉi ĉiuj gazetoj kaj multaj aliaj likvidiĝis dum la milito. Nur Esperanto (§ 16) kaj kelkaj naciaj gazetoj daŭris aperi. Krome eliris dum 1915-18 Internacia Bulteno (pri la milito), kiu celis defendi la germanan vidpunkton.

Post la milito ekaperis multaj novaj gazetoj, sed granda parto el ili ne vivis longe. La ĉefaj nuntempe regule aperantaj internaciaj gazetoj estas: Esperanto-Ligilo, Esperanto (UEA), Espero Katolika, Heroldo de Esperanto (semajna),<sup>1)</sup> Internacia Pedagogia Revuo, Internacia Medicina Revuo, Sur Posteno (§ 47), Interligilo de PTT, La Kritika Observanto, Lingvo-Libro, Literaturo Mondo, Nia Gazeto, La Socialisto, La Praktiko, Scienca Gazeto, Sennacieco Revuo (§ 37), Sennaciulo (§ 38).

<sup>1)</sup> Poste pro la malpermeso de Esperanto en Germanio eldonita en Roterdamo, sub la titolo Esperanto Triumfonta, nun denove eldonata sub la titolo Heroldo de Esperanto, redaktata en Hago, Nederlando.



### 19. La Delegitaro. - Ido.

En la jaro 1900 stariĝis en Parizo, laŭ iniciato de s-roj Leau (Lo) kaj Couturat (Kutura), Delegitaro por alpreno de Lingvo Internacia.

La celo de ĉi tiu Delegitaro estis efektiviĝi la elekton de Lingvo Internacia de ia kompetenta institucio. Laŭ ĝia regularo ĉi tiu elekto estus farata de la Internacia Asocio de Akademioj, aŭ se ĉi tiu rifuzus, de Komitato elektota de la delegitaro mem.

Entute 310 asocioj kaj pli ol 1200 universitataj profesoroj kaj scienculoj aliĝis al ĝi.

Dume supre nomitaj sinjoroj publikigis detalan studon Historio de Lingvo Internacia (franclingva) en kiu ili pri-traktis la diversajn sistemojn de lingvo internacia kaj i.a. favore prijuĝis Esperanton.

En sia kunveno en majo 1907 la Internacia Asocio de Akademioj deklaris sin nekompetenta por solvi la mondlingvan demandon. De tiam la delegitaro mem eklaboris por okazigi la elekton de starigota Komitato.

S-roj Leau kaj Couturat proponis al ĉiu aliĝinta societo liston de kandidatoj por tiu Komitato. Ĉiuj proponitoj estis elektataj. Tiel formiĝis 12-membra Komitato konsistanta el diverslandaj scienculoj. Inter ili estas du lingvistoj, du medi-

cinistoj, unu matematikisto, unu astronomisto, unu kemiisto, unu historiisto kaj unu filologo. Estis ankaŭ unu esperantisto, nome E. Boirac. Kiel sekretariojn oni aldonis al la Komitato s-rojn Leau kaj Couturat.

La Komitato kunvenis de la 15-a ĝis la 24-a de oktobro 1907 en Parizo. Okazis 18 kunsidoj. La plimulto de la komitatanoj ne ĉeestis. Boirac partoprenis nur 2 kunsidojn, poste lin anstataŭis G. Moch.

La aŭtoroj de diversaj sistemoj de lingvo internacia defendis sian projekton en la kunvenoj de la Komitato. Por Esperanto venis laŭ peto de d-ro Zamenhof, de Beaufront, fervora kaj konservema propagandisto. Priparolinte diversajn projektojn la Komitato decidis, ke neniu el la lingvoj ekzamenitaj povas esti alprenata sen modifoj. Principe ĝi alprenis Esperanton pro ĝia relativa perfekteco kaj pro la multaj kaj diversaj aplikoj jam ricevitaj, sed sub la kondiĉo, ke estu farataj en ĝi kelkaj ŝanĝoj, laŭ la konkludoj en la raporto de la sekretarioj kaj laŭ la projekto Ido. Pri ĉi tio oni klopodus atingi interkonsenton kun la Esperantista Lingva Komitato.

Ĉi tiu decido estis komunikata al la LK la 24-an de oktobro 1907 kun la peto respondi antaŭ la 5-a de decembro. La decido de Komitato kaŭzis grandan indignon ĉe la esperantistaro. Kiu do estis la aŭtoro de la nova projekto, kiu kaŝis sin sub la nomo Ido? Ĉu de Beaufront? Ĉi tiu en sia gazeto rekomendis al la esperantistoj daŭrigi la laboron por Esperanto kiel antaŭe kaj nur en februaro 1908 li konfesis, ke li estis Ido, la aŭtoro de la proponitaj reformoj!

La LK akorde kun la opinio de la plimulto de la esperantistaro indigne malaprobis la agmanieron de la Komitato kaj decidis kun granda plimulto ne akcepti ties proponon (ultimaton).

Post ĉi tio la Komitato tuj eklaboris por disvastigi la novan lingvon, kiu komence nomiĝis reformita Esperanto kaj poste Ido. Ĝi eldonis diversajn lernilojn kaj revuon Progreso. Plie oni stariĝis Akademion por daŭrigi la studadon pri la lingvo kaj pliperfektigi ĝin. En Progreso oni pridiskutis la lingvon ĉiuflanke kaj dum longa tempo oni daŭre ŝanĝis ĝin. Nur en 1914 oni komprenis, ke tiu ŝanĝado ne povos daŭri kaj oni proklamis periodon de stabilo.

Kvankam en la komenco kelkaj esperantistoj transiris al Ido, la idistoj tamen ne sukcesis varbi atentindan nombron

da adeptoj. Aliflanke pluraj idistoj revenis al Esperanto aŭ transiris al ankoraŭ alia sistemo.

Malgraŭ sia malgranda nombro da adeptoj la ido-movadeto ĝis nun restis ekzistanta. Ĝia ĉefa organo estas Progreso, trimonata revuo, eldonata en Svedio.

Kelkaj post Ido aperintaj novaj projektoj estas i. a.: *Novial*, de eks-idisto profesoro O. Jespersen, *Occidental*, de E. de Wahl, *Medial*, de J. Weisbart.

La fakto, ke tiel Ido kiel aliaj poste aperintaj projektoj de mondlingvo ne multe kaj ne grave diferencas de Esperanto montras, ke la bazo de nia lingvo estas ĝusta. La esperantistoj do povas trankvile daŭrigi sian laboron.



## IV. LABORISTA MOVADO.

### a) Antaŭ la mondmilito. <sup>1)</sup>

#### 20. Gupoj, asocioj, gazetoj.

La unuaj pioniroj de Esperanto estis precipe homoj el la mezaj klasoj: instruistoj, kuracistoj, oficistoj, k.s. Nur post 1900 ankaŭ laboristoj envicigis sin en la movado. Diverslande iuj laboristoj lernis la lingvon kaj ekpropagandis ĝin. Tiel estiĝis en 1905-1908 la unuaj laboristaj Esperanto-grupoj en Frankfurto, Hago, Hamburgo, Munĥeno, Parizo, Stokholmo kaj aliaj lokoj.

Poste stariĝis en kelkaj landoj naciaj asocioj, kiuj kunigis la lokajn grupojn.

En Britio oni fondis jam en 1907 la Britan Ligon de Esperantistaj Socialistoj (BLES). Ŝajne ĝi konsistis ne el lokaj sekcioj, sed el dise loĝantaj unuopaj esperantistoj. Ĝi ne havis multajn membrojn.

En Ĉeĥoslovakio ekfunkciis en 1911 la Laborista Asocio Esperantista. En 1912 ĝi havis ĉ. 500 anojn. Ĝia organo *Kulturo* aperis monate je eldonkvanto de 2000 ekz.oj. En Francio ekzistis diversaj grupoj, precipe en Parizo, kaj monata propaganda gazeto *Le Travailleur Esperantiste* (Laborista Esperantisto).

En Germanio oni fondis en 1911 la Germanan Laboristan Esperantistan-Asocion (GLEA). Kiel organo de ĉi tiu asocio eliris ĝis 1914 monata gazeto *Antaŭen*.<sup>2)</sup> GLEA estis la plej forta laborista Esperanto-asocio; en 1913 ĝi havis ĉ. 1400 membrojn.

En Nederlando fondiĝis en 1911 la Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj, kiu en 1913 havis ĉ. 200 membrojn. Ĝia organo *Arbeider-Expectantist* (Laborista Esperantisto) aperis en la jaroj 1913-1914.<sup>3)</sup>

En aliaj landoj, kie ne ekzistis naciaj asocioj, tamen funkciis diversaj lokaj grupoj. Eĉ en cara Rusio, kie laborista

<sup>1)</sup> Pli detalan priskribon oni trovas en la broŝuro *Laborista Esperanta Movado antaŭ la mondmilito*, de G. P. de Bruin. Eld. SAT, 1936.

<sup>2)</sup> Antaŭ ĝi en 1910 aperis *Der Arbeiter-Expectantist* (La Laborista Esperantisto) privata eldonaĵo de iu sinjoro Schlafl, (Slaf) kiu fondis Laboristan Esperanto-ligon kaj faris sin mem prezidanto de tiu ligo. Li estis eksigata en la fonda kongreso de GLEA.

<sup>3)</sup> Antaŭe jam eliris en 1908-1911 gazetoj Frateco kaj Laborista Esperantisto ambaŭ eldonitaj de la Haga grupo. Nederlandlingvanoj legu la *Jubileumboek*, eld. Fed. de Lab. Esp., 1936.



esperanta movado ne estis permesita, troviĝis esperantistoj, kiuj propagandis nian ideon.

En Ĉinio anarkiistaj kamaradoj aktive laboris por Esperanto. K-do Ŝifo eldonis tie, dum la jaroj 1914-1916, kvankam neregule, gazeton *La Voĉo de la popolo*, en kiu estis 4 paĝoj esperantlingvaj. En 1913 aperis dum kelka tempo grandformata gazeto *Hina Socialisto*, kiu ankaŭ estis parte en Esperanto redaktita.

★

## 21. Liberiga Stelo.

Internacia organizo de laboristaj esperantistoj estis la asocio Paco-Libereco, pli konata laŭ sia posta nomo Liberiga Stelo. Ĝi fondiĝis en 1906 laŭ iniciato de Fi Blan Go (F. Blangarin) kaj R. Louis (Luis) en Parizo. La celo estis: batali kontraŭ la armeo kaj la militismo, la kapitalismo, la alkoholismo kaj ĉiuj dogmoj kaj antaŭjuĝoj, disvastigi Esperanton ĉe internaciistoj, liberpensuloj, socialistoj, liberecanoj, ktp., propagandi kontraŭmilitistajn, socialismajn kaj liberecanajn ideojn ĉe la esperantistoj. Poste oni iom alie formulis la celon, sed esence ĝi ne multe ŝanĝiĝis.

Liberiga Stelo havis lokajn grupojn kaj unuopajn membrojn en kelkaj landoj. Tamen la plimulto de la membraro loĝis en Francio, kie estis la sidejo de la asocio. Ĝi aranĝis kursojn kaj kunvenojn precipe en Parizo, eldonis propagandbroŝurojn en la franca lingvo kaj aperigis kelkajn kontraŭmilitismajn libretojn en Esperanto.

Liberiga Stelo kaj ĝiaj principoj ne trovis aprobon ĉe la plimulto de la laboristoj esperantistaj. Generale oni preferis alian organizformon, kies bazo estu la ekzistantaj naciaj organizoj. En 1914 okazus en Parizo internacia kongreso, kiu decidus pri ĉi tiu afero. Pro la militeksplodo ĉi tiu kongreso ne okazis.

★

## 22. Internacia Socia Revuo.

En 1906 aperis la unua numero de Rondiranta Folio por la kreado de tutmonda Socia Revuo, redaktita kaj eldonita de M. Verama (ps. de P. Berthelot (Bertelo) en Genevo. Ĝin sekvis ankoraŭ 3 aliaj numeroj kaj poste eliris en januaro 1907 Internacia Socia Revuo, kun la subtitolo „monata esperanta gazeto, internacie redaktata kaj ilustrata, pri ĉio, kio interesas la homaran vivadon”.

La unuajn tri jarojn ĝin redaktis k-do Fi-Blan-Go kaj administris k-do R. Louis. En 1910-1911 k-do J. L. Bruyn (Brojn) en Hago estis redaktor-administranto kaj post li ĝis 1914 k-do W. Nutters en Amsterdamo plenumis tiun taskon.

La enhavo de la revuo estis: teoriaj artikoloj pri sociaj temoj, raportoj pri vivo kaj batalo de la laboristoj, informoj pri la laborista esperantista movado ktp.

Ĉiuj tendencoj de la laborista movado partoprenis en ĝi. Materie la gazeto en la unuaj jaroj ne fartis bone. Poste ĝi prosperis pli bone, tiel ke oni eĉ pensis pri duonmonata aperigo. En 1914 pro la militeksplodo ISR ĉesis aperi.

★

## 23. Literaturo.

La unuaj proletaj esperanto-eldonaĵoj estis tiuj de *Paco-Libereco*:

U. Gohier,	<i>Al la virinoj.</i>
G. Hervé,	<i>Antipatriotismo.</i>
Laissant,	<i>La parlamentisma iluzio.</i>
S. Faure,	<i>Krimoj de Dio.</i>
.....	<i>Gvidlibreto por soldatoj en ĉiuj landoj.</i>

Ĉe *Internacia Socia Revuo* aperis serio da broŝuroj, plej parte tradukitaj de D. Ivanski (pseudonime: D. J.) kaj W. Nutters:

P. Berthelot,	<i>La evangelio de la horo.</i>
E. Ferri,	<i>Kio estas socialismo?</i>
F. Lasalle,	<i>Pri la esenco de konstitucio.</i>
F. D. Nieuwenhuis,	<i>La piramido de tiranio.</i>
P. Staniŝiĉ,	<i>La reforma mono de S. Gesell.</i>
W. Liebknecht,	<i>Por ataki kaj defendi.</i>
P. Kropotkin,	<i>La Salajro.</i>
Victor Hugo,	<i>La Mizeruloj. (Unua volumo.)</i>
Jack London,	<i>La forto de la fortaj.</i>

Plie aperis ankoraŭ:


Marks & Engels,	<i>La manifesto de la komunista partio.</i>
M. Cachin,	<i>Laborista klaso kaj socialismo.</i>

★

## 24. Kongresetoj.

Internacia kongreso de laboristaj esperantistoj ne okazis antaŭ 1921. Tamen jam antaŭ 1914 ĉe kelkaj neŭtralaj esperantistaj kongresoj malgranda nombro da laboristaj partoprenantoj kunvenis aparte, por preparoli siajn proprajn aferojn. Tiaj kunvenoj, kongresetoj, havis lokon en Genevo 1906, Kembridge (Cambridge) 1907, Dresdeno 1908, Antverpeno 1911, Krakovo 1912, Berno 1913. En 1910 okazis samloke kaj samtempe kun la Internacia Socialista Kongreso en Kopenhago t.n. Esperanto-kongreso, kiun partoprenis el ekster Danio nur kelkaj kamaradoj el Britio, Germanio kaj Nederlando.

Generale ĉi tiuj kongresetoj utilis nur por reciproka konatiĝo kaj interŝanĝo de opinioj. Oni parolis, proponis, decidis, sed mankis organoj por plenumi la decidojn. Krome ne estis tiutempe ĉe la laboristaj esperantistoj sufiĉe klara kompreno pri la celo kaj taskoj de la movado. Forestis unueco de starpunkto, kaj la eblo de komuna agado estis do malgranda. Ĉi ĉio estis la kaŭzo de la relativa senfrukteco de nomitaj kongresetoj.



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO



## b) Laboristaj Esperanto-Asocioj (LEA-oj).

### 25. Aŭstrio.

Fondiĝis en 1922 la Aŭstria Laborista Ligo, kies sidejo estis la unuan jaron en Linz kaj poste en Vieno. Komence ĝi ne tre prosperis. En 1924 ĝi estis reorganizata kaj alinomiĝis Aŭstria Laborista Ligo Esperantista (ALLE). De tiam ĝi funkciis laŭ unueca statuto, kiu validis por ĉiuj ĝiaj grupoj kaj membroj.

ALLE interrilatis kun la germanlingva LEA kaj akceptis ties gazeton *Arbeiter Esperantist* (Laborista Esperantisto) kiel oficialan organon. Ekde 1926 ĝi eldonis propran gazeton *La Socialisto*, kiu en 1933 iĝis ankaŭ la organo de la Socialista Esperanto-Asocio (Germanio), de la nove fondita Ĉeĥoslovaka Laborista Esperanto-Asocio kaj de la Hungaria Esperantista Societo Laborista.

Dum kelka tempo (1924-27) ekzistis organizo konkurenca al ALLE, nome la Socialdemokrata Esperanto-Federacio de Aŭstrio. En 1927 ambaŭ organizoj kunfandiĝis kaj de tiam ALLE unuigis preskaŭ la tutan laboristan esperantistaron de Aŭstrio.

ALLE estis ideologie ligita al la socialdemokrata partio aŭstria, kiu agnoskis ĝin kiel kulturalan organizon de la socialdemokrata laboristaro. Same *La Socialisto* estis agnoskita kiel partia gazeto.

En la fino de 1932 ALLE nombris 53 grupojn kaj havis entute 1746 membrojn. La eldonkvanto de *La Socialisto* estis 3300 ekz.oj.

ALLE iniciatis en 1933 la starigon de la Internacio de Socialistaj Esperantistoj (ISE). Ĝia organo *La Socialisto* iĝis la oficiala organo de tiu Internacio.

Kiam la nova reĝimo, estiĝinta post la okazintaĵoj en marto 1934, malpermesis ĉiujn laboristajn organizojn, tiu sorto trafis ankaŭ ALLE-on. *La Socialisto* ĉesis aperi, sed poste reeliris en Francio, kiel organo de ISE.



### 26. Britio.

Ĉi tie la laborista esperanta movado neniam estis forta. En 1920 la restarigita Brita Ligo de Esperantistaj Socialistoj (BLES) havis nur ĉ. 30 membrojn. Unu jaron poste la estraro eĉ proponis malfondi la ligon pro ĝia malbona stato. Ĉi tio tamen ne okazis kaj BLES daŭrigis sian laboron. Ĝi

eldonis flugfoliojn, broŝuron *Labour and Esperanto* (Laboristaro kaj Esperanto) kaj propagandis ĉiamaniere. Ĉi tiu agado ne restis sensukcesa kaj iom post iom ĝi akiris kelkan influon ĉe laboristaj organizoj. Grava laborista kleriga revuo *Plebs* enpresigis regule notojn pri aŭ el Esperanto. La Nacia Konsilantaro de Laboristaj Kolegioj (marksista laborista kleriga organizo) akceptis Esperanton en siaj kursoj kaj eldonis tradukon en la angla lingvo de la broŝuro *La Laborista Esperantismo*, de Lanti. Diversaj ĉefuloj el la laborista movado subskribis alvokon favoran al Esperanto (1925).

En 1927 BLEA alinomiĝis Brita Laborista Esperanto-Asocio (BLEA). Ĝi neniam havis pli ol kelkajn centojn da membroj, kvankam la nombro da laboristaj esperantistoj en Britio estis pli granda. En 1932 BLEA transiris al IPE (§ 47) kaj de tiam do ne plu estas superpartieca. Parto de la membraro, ne aprobante ĉi tiun decidon, ekŝiĝis kaj grupiĝis en nova organizo nomata SATEB (SAT en Britio).

Ambaŭ organizoj eldonas ciklostilitan gazeton; tiu de BLEA nomiĝas *Ruĝa Esperantisto*, tiu de SATEB estas *La Laborista Esperantisto*.



## 27. Francio.

Parizaj laboristaj esperantistoj reaperigis en 1919 *Le Travailleur Esperantiste* (Laborista Esperantisto), kiu vekis la malnovajn kamaradojn en Francio al nova agado kaj per publikigo de valoraj artikoloj de Barbusse (Barbus), Romain Rolland (Romen Rolan) kaj aliaj pli malpli famaj homoj multe subtenis la propagandon. Ĝi vivis 2 jarojn. En 1921 stariĝis la Federacio Esperantista Revolucia, kiu eldonis en 1922-23 *L'Esperantiste Revolutionnaire* (Revolucia Esperantisto), kiu siavice estis anstataŭata de *L'Antinationaliste* (Kontraŭnaciisto). Ĉi lasta vivis ĝis 1924.

En Francio estis en 1921-23 relative forta Ido-movado kaj la francaj kamaradoj devis forte batali kontraŭ ĝi. Ili sukcesis en tiu batalo; fine la idistoj estis silentigataj. Tamen ĉi tiu idista agado iom malfavore influis la laboristan esperantan movadon kaj malhelpis ties rapidan kreskon.

En 1923 la Federacio aliĝis sian nomon en Federacio Esperantista Laborista por la franclingvaj regionoj. De 1927 ĝi eldonis bultenon *Le Travailleur Esperantiste*, kiu aperis dumonate. Plie ĝi aperigis detalan lernolibron kun antaŭ-

parolo de Barbusse, kiu jam atingis duan eldonon, same kiel la de ĝi publikigita ampleksa propaganda broŝuro.

En 1932 la Federacio havis ĉ. 900 membrojn; la nombro da sekcioj estis 46, el kiuj kelkaj estis en Afriko, Belgio kaj Svisio. En la sama jaro parto de la membraro, ne sukcesinte trudi al la organizo sian partipolitikan starpunkton forlasis la Federacion kaj starigis novan asocion, la Federacion de Esperantistaj Proletoj. Ĝi eldonis gazeton *Proleta Esperantisto*.

En 1936 post la starigo de la Popolfronto en Francio ambaŭ organizoj rekuniĝis sub la nomo Franclingva Laborista Esperanto-Asocio. Ĉi tiu nombras ĉ. 2000 membrojn en 93 grupoj. Monata organo estas *Le Travailleur Esperantiste*.



## 28. Germanio.

La Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA) restariĝis en 1919 kun ĉ. 400 membroj. Samjare reeliris la asocia organo *Antaŭen*, kiu unu jaron poste ŝanĝis sian nomon en *Deutscher Arbeiter Esperantist* (Germana Laborista Esperantisto). De 1922 ĝi nomiĝis *Arbeiter Esperantist*. Pro la malbona ekonomia situacio la movado nur malrapide kreskis. En 1920 GLEA havis 565 membrojn. Sed du jarojn poste ĝia membraro nombris jam ĉ. 2000. Dum kelka tempo GLEA liveris al siaj membroj *Sennaciecan Revuon*; sed pro manko de mono ĝi ne povis daŭrigi tion.

En 1924 oni klopodis plivastigi la agadkampon de la asocio kaj ĝi alinomiĝis Laborista Esperanto-Asocio por la germanlingvaj regionoj (LEA). Ĉi tiu ŝanĝo tamen ne multe utilis; nek el Aŭstrio, nek el Svisio, nek el aliaj germanlingvaj regionoj aliĝis iuj grupoj. Dume la membraro tamen kreskis, tiel ke necesis dungi oficiston, kiu i.a. devis prizorgi la librejan fakon starigitan en 1922. LEA eldonis diversajn broŝurojn, kantaronojn, flugfoliojn kaj du lernolibrojn. Krome ĝi funkciigis de 1924 peresperantan gazetservon.

En 1930 LEA havis ĉ. 3600 membrojn en ĉ. 200 lokoj. En tiu jaro okazis skismo en ĝi (§ 45) kaj stariĝis la Socialista Esperanto-Asocio por la germanlingvaj regionoj (SEA). Ĉi tiu nombris en 1933 ĉ. 1500 membrojn. Ĝi eldonis la broŝuron *La Laborista Esperantismo* de Lanti en germana lingvo, propran kantaronojn kaj lernolibron. Ĝi publikigis

ankaŭ infangazeton *Amikecon*. Kiel ĝia oficiala organo servis *La Socialisto*, de ALLE (§ 25).

La nacisocialista reĝimo tuj neniigis la proletan Esperantomovadon en Germanio. LEA, la IPE-sekcio, estis malpermesata kaj ĝiajn havaĵojn oni konfiskis. Ankaŭ *Arbeiter Esperantist*, ĝia organo, do malaperis.

SEA klopodis savi sian vivon per transformiĝo en Asocio de Esperanto-Amikoj, sed ankaŭ tion oni ne permesis.

En 1936 malaperis la restinta (neŭtrala) parto de la Esperantomovado. Ĉiuj organizoj estis likvidataj, ĉiu agado por Esperanto malpermesita. De tiam Esperantomovado do ne plu ekzistas en Germanio.



### 29. Hungario.

En 1918 restariĝis la Hungaria Esperantista Societo Laborista (HESL). Komence ĝi ne povis multon fari pro la revolucia situacio; tiutempe ĝi havis nur centon da membroj. Sed ankaŭ poste ĝin ĉiam malhelpis la premanta politika reĝimo. Multaj grupoj, precipe ekster la ĉefurboj, suferis policajn kontrolojn, malpermesojn, ktp. Propagando por kaj aliĝo al SAT estis malpermesitaj.

Malgraŭ ĉi tiuj malfavoraj cirkonstancoj HESL vigle laboris kaj kreskis. Ĝi aperigis 2 propagandbroŝurojn, diversajn flugfoliojn, afiŝojn ktp.

En 1923 aperis presita organo *Antaŭen*, sed ĝi ne vivis longe. Ĝin anstataŭis ciklostilita *Sciigilo*. Dum kelka tempo, ĝis 1929 HESL partoprenis en hungarlingva gazeto *Laborista Kulturo*. Poste aperis ciklostilita informilo *Antaŭen* kaj de 1933 servis kiel organo de HESL la aŭstria *La Socialisto*. HESL havis eldonfakon kaj librovendejon. Ĉi tiu aperigis i.a. lernolibron, vortaron Hungara-Esperantan, du verkojn de Baghy kaj kantarono. En 1933 la asocio havis ĉ. 850 membrojn en 36 lokoj.

HESL partoprenis en la starigo de ISE, sed ŝajne tion faris la estraro sen interkonsiliĝo kun la membraro. Poste (1934) estiĝis konflikto inter la gvidantoj de HESL kaj la estraro de la hungara socialdemokrata partio. Sekve de tio oni ekzigis HESL el la kadro de tiu partio. Kelkajn monatojn poste la societo estis disigata laŭ ordono de la registaro.



### 30. Nederlando.

La Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj restarigita en 1918 bone laboris en la jaroj 1920-23. Ĝi eldonis kun la neŭtrala asocio propagandan gazeton *Nederland-Esperanto* (poste *Holanda Esperantisto*), aperigis en 1922-25 neregule gazeton *Intermembra Informilo*, publikigis kelkajn broŝurojn kaj flugfoliojn kaj funkciigis *Laboristan Esperanto-Servon*. En la periodo 1924-27 ĝi nur vegetis. Ekzistis tiam en Nederlando ia malinklino al SAT. Malgranda nombro da SATanoj klopodis disvastigi la SAT-ideon, sed estis kontraŭataj de la tiama Federacia estraro, kiu - laŭ kongresdecido - klopodis starigi laboristan esperantistan Internacion. Pro ĉi tiu situacio la nederlandaj laboristaj esperantistoj estis iom izolitaj, ne havis kontakton kun alilandaj kamaradoj. Ĉi tio malfavore influis la movadon.

En 1928-29 la situacio aliĝis; la Federacio ekhavis novan estraron, aperigis gazeton *Laborista Esperantisto*, akceptis la klasbatalan starpunkton (antaŭe ĝi estis neŭtrala!), serĉis kontakton kun SAT kaj de tiam ĝi iris grandpaŝe antaŭen. Kun helpo de la Asocio de Laboristaj Radio-Amatoroj (VARA) ĝi okazigis diversajn elsendojn pri- kaj peresperantajn. Ankaŭ radio-Esperantokurso aranĝita de la Federacio sub la aŭspicoj de la Instituto por Laborista Klerigo (IVAŬO), estis elsendita de nomita asocio (1931-32).

En 1930 la Federacio pligrandigis sian laborkampon per la decido akcepti ankaŭ membrojn kaj sekciojn en flandra Belgio. De tiam la nomo de la Federacio tekstas: Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo.

La Federacio laŭbezzone kunlaboris kun la aliaj naciaj esperanto-asocioj. En 1931 la plimulto el tiuj asocioj ne volis akcepti la Federacion kiel samrajtan kunorganizanton de la ekzamenoj. Tiam la Federacio mem starigis Ekzamenan Komitaton. Funkciinte du jarojn ĝi estis anstataŭata de komuna Ekzamena Komitato de la neŭtrala Nederlanda Esperantista Asocio kaj la Federacio.

Libro-Servo estis starigita en 1931. Krom ĉiuspecajn propagando-eldonaĵojn, ĝi aperigis du lernolibrojn *Nia Lernolibro* kaj *La Komencanto*, superan studlibron *Tra la labirinto de la gramatiko*, verkon pri lingvaj malfacilaĵoj *La Konsilanto*, serion da legolibretoj *Unuaj paŝoj en nova*

mondo, vortareton, kantaron ktp. Kune kun SAT ĝi eldonis la *Gvidilon tra la Esperanto-movado* kaj la broŝuron *Absolutismo*.

Monata studgazeto *La Progresanto*, eldonita de 1934, servas por plialtigi la lingvan nivelon de la membraro. Por la infanoj la Federacio eldonas gazeteton *La Vojo*.

Regule aperantaj gazetarsciigoj, radioelsendoj, sukcesaj kongresoj kun centoj da partoprenantoj plenumas parton de la grandampleksa propaganda laboro. Dank' al ĉi tiu laboro la laborista gazetaro pli kaj pli malfermas siajn kolonojn por Esperanto.

Kun SAT la Federacio havas amikajn rilatojn. Ĝi ne nur subskribis la Goteborgan Konvencion, sed krome ĝi, laŭ kongresdecido de 1932, por eviti disputpunktojn en la organiza vivo, malpermesas al siaj anoj esti membro de la internaciaj organizoj IPE (§ 47) kaj ISE (§ 49).

Al ĉiuj siaj membroj la Federacio liveras senpage la federacian gazeton *Laborista Esperantisto* kaj la SAT-organon *Sennaciulo*.

La membronombro de la Federacio nun (oktobro 1936) estas ĉ. 4700; la nombro da sekcioj: 155. Inter ĉi tiuj estas 9 sekcioj kun 160 membroj en Flandrio. *Laborista Esperantisto* aperas minimume 12-paĝa kun eldonkvanto de 6000 ekzempleroj.

En 1936 la Federacio festis sian 25-jaran jubileon. Ĉi tiu fakto estis memorigata per impona kongreso en Hago (1350 partoprenantoj) kaj riĉe ilustrita, multipaĝa *Jubilea Libro*.<sup>1)</sup> Ekzistas ankaŭ Nederlanda Unuiga Komitato, kiu propagandas la ideojn de IPE kaj la Socialdemokrata Esperantista Ligo, sekcio de ISE, fondita en 1935. Ambaŭ eldonas ciklostilitan gazeteton nomitaj respektive *Ruĝa Batalanto* kaj *Libereco*.

<sup>1)</sup> En ĉi tiu libro, eldonita en nederlanda lingvo, oni trovas pli detalajn informojn pri la agado de la Federacio.



### 31. Sovetio.

Post kelkaj malsukcesintaj provoj por unuigo de la sovetiaj esperantistoj en unu organizo (Tutruslanda Federacio Esperantista, Esperanto-Sekcio de Komunista Internacio k.a.) fondiĝis en 1921 la Sovetlanda Esperantista Unuigo (nun Sovetrespublikara Esperantista Unio). Kvankam malhelpate de la ekonomiaj cirkonstancoj, ĝi sukcesis iom post

## KOREKTOJ KAJ ALDONOJ

pĝ. 7-a	11-a linio de	malsupre	4 listoj	d.e. 6 listoj
" 20-a	9-a	" "	supre Ifengio	d.e. Ifengio
	12-a	" "	supre George	d.e. George
" 21-a	8-a	" "	supre Wagnals	d.e. Wagnalls
	5-a	" "	malsupre El	d.e. En
	1-a	" "	malsupre Odussesias	d.e. Odusseias
" 22-a	5-a	" "	supre F. Karinty	d.e. M. Babits
	8-a	" "	malsupre Sienkewicz	d.e. Sienkiewicz
	2-a	" "	malsupre Aelito	d.e. Aelita
" 24-a	5-a	" "	supre Bauouin	d.e. Baudouin
	9-a	" "	supre Rembrandt, ktp	d.e. Naciismo ktp.
	10-a	" "	supre La rasoj ktp	d.e. Rembrandt ktp.
	11-a	" "	supre Grekaj papirusoj	d.e. La homaj rasoj ktp.
	12-a	" "	supre Naciismo ktp	d.e. Grekaj papirusoj
	14-a	" "	supre P. Gille	d.e. P. Gilles
			Filozofio ktp	d.e. Skizo pri filozofio de ktp.
	7-a	" "	malsupre Wezl	d.e. Welzl
	6-a	" "	malsupre tradukitoj	d.e. tradukitaj
	1-a	" "	malsupre Stephan	d.e. Stephen

### ALDONOJ:

pĝ. 23	Emba	Maria kaj la grupo.
	J. Forge (J. Fethke),	Abismoj.
	"	Saltego trans jarmiloj.
	"	Mr. Tot aĉetas mil okulojn.
	E. Izgur	Je la nomo de l' vivo.
	T. Jung	Landoj de l' fantazio.
	J. Merchant	Tri angloj alilande.

pĝ. 64 la demandoj 101-103 rilatas al ĉapitro 14.

Kelkajn aliajn preserarojn la leganto mem bonvolu korekti.

iom kolekti en siaj vicoj la plej grandan parton de la sovetia esperantistaro. Ĝi aperigis diversajn propagandilojn kaj eldonas monatan Bultenon kaj revuon *Mezduarodny Jazyk* (Lingvo Internacia).

Okoze de la 5-jara ekzisto de Sovetio, SEU eldonis albumon *Kvinjaro de Sovetlandoj*. Poste ĝi aperigis sub la titolo Komunista Biblioteko serion da verketoj de Buĥarin Lenin, Stalin k.a. Kun la Unio de Militantaj Ateistoj ĝi publikigis broŝuron *La Vero pri la persekutado al la religio en USSR*. Plie aperis ĉe SEU detala broŝuro *Militpreparantoj* (akuza konkludo je proceso de la Industria Partio) kaj serio da flugfolioj *La vero pri Sovetio*, celanta respondi diversajn demandojn faritajn de eksterlandaj korespondantoj.

Kvankam SEU dum 7-8 jaroj kunlaboris kun SAT kaj estis ties sola reprezentanto en Sovetio, ĝi, aŭ almenaŭ parto de ĝiaj gvidantoj, ne aprobis la strukturon kaj tendencon de SAT. Estis la SEU-gvidantaro, kiu ludis la ĉefan rolon en la bedaŭrinda skismigo de la laborista esperanta movado. Kiam en 1933 post la konataj okazintaĵoj en Germanio, *Internaciisto*, la organo de IPE, ne plu povis aperi, la *Bulteno de SEU* fariĝis komuna organo de SEU kaj IPE sub la titolo *Sur Posteno*. De 1934 tiu komuneco ĉesis kaj aperis kiel organo de SEU *Sur Posteno Klasbatala*. Ŝajnas tamen, ke post la skismo kaj malgraŭ la ekzisto de IPE la agado de SEU ne tre plimultiĝis.

Estas malfacile akiri ĝustajn informojn pri la nuntempa stato de la movado en Sovetio. La organo de SEU aperas tre neregule, ĉar oni preferas uzi la disponeblan paperon por lernolibroj ktp. Laŭ noto en *Sur Posteno Klasbatala* (n-o 1-2, 1936) ĝia eldonkvanto estas 2500, sed la membro-nombro estas, laŭ ciferoj en la sama numero 14237, jene dividita: membroj-esperantistoj 5111, membroj-junesperantistoj 3172, membroj-amikoj 5954. Supozeble la unua kategorio konsistas el aktivaj membroj kaj la du lastaj el subtenantoj.

La laboro de la sovetiaj esperantistoj koncentriĝas ĉefe je la organizita korespondado kun laboristoj en aliaj landoj (*Proleta Esperanto-Korespondado* - PEK.)

Multaj neesperantistaj organizoj vaste utiligas Esperanton praktike, ĉu korespondante per ĝi kun la eksterlando, ĉu eldonante en ĝi diversajn publikigaĵojn.

★

### 32. Svedio.

Ĉi tie la komenco de la laborista esperanta movado datumas de 1921, kiam kelkaj kamaradoj, ĝis tiam partoprenintaj en la neŭtrala movado spertis la neceson de propra organizo. Ili starigis en 1922 la Svedan Laboristan Esperanto-Asociacion (SLEA). Komence ĝi havis nur kelkajn dekojn da membroj, sed propagandante per monate eliranta gazeto *Sveda Laborista Esperantisto* ĝi baldaŭ kreskis. En 1923 ĝi havis jam 200 membrojn. Ĉi tiu nombro iom post iom pligrandiĝis precipe post la SAT-kongreso en Göteborg 1928. Nuntempe (1936) SLEA havas ĉ. 1800 membrojn en 100 lokoj. La nombro da sekcioj estas 60. La eldonkvanto de ĝia organo Sveda Laborista Esperantisto, kiu aperas en granda formato, 12-paĝa, estas 2300 ekzempleroj. Dum kelkaj jaroj la asocio eldonis ĉiujare ampleksan, svedlingvan ilustritan gazeton *Sommar*, kiu multe subtenis la propagandon. SLEA sukcesis interesi por sia laboro diversajn politikajn kaj sindikatajn organizojn kaj varbi ilin kiel subtenantajn membrojn, kiuj pagas jaran kotizon de 5 ĝis 50 svedaj kronoj. En la fino de 1936 la nombro da tiuj aliĝintoj estis, inklusive personoj subtenantaj, ĉ. 200.

SLEA aperigis en Esperanto *Raporton de la sveda ŝtatoficista delegacio pri vojaĝo tra Sovetio kaj Sub ruĝaj standardoj* (impresoj kaj travivaĵoj en Sovetio) de E. Adamson. Kun SEA en Germanio ĝi eldonis laboristan Esperanto-lernolibron kun svedlingva gramatiko. En sveda lingvo aperis ĉe SLEA i.a. *La Laborista Esperantismo*, de E. Lanti kaj *De Leningrado tra suna Ukraino ĝis Krimeo* (vojaĝraporto) de E. Adamson. Aliaj eldonaĵoj de SLEA estas la *SLEA-Kantaro* kaj skriba Esperanto-kurso.

Kun la du aliaj - burĝaj - Esperanto-organizoj SLEA fondis Svedan Esperanto-Instituton, kiu i.a. organizas ekzamenojn. Pere de ĉi tiu organizo membroj de SLEA kelkfoje parolis antaŭ la mikrofono.

Pro la influo de SLEA-anoj la sveda socialdemokrata partio akceptis favoran rezolucion pri Esperanto. Ĝia estraro donis subvencion al SLEA-reprezentantoj el la partio por ĉeesti SAT-kongresojn. Socialdemokrataj kaj sindikataj gazetoj akceptas artikolojn pri Esperanto kaj kelkaj enpresigis kurson de 10 lecionoj.

SLEA intime kunlaboras kun ABF (kleriga asocio de laboristoj), kiu organizas multajn kursojn en Esperanto.

### 33. En aliaj landoj,

i. a. en Ĉeĥoslovakio, Danio, Norvegio, Polio, Japanio ekzistas LEA-oj aŭ similaj centroj de laborista esperanta agado, sed ili estas ĉu malfortaj, aŭ (kaj) nur antaŭ nelonge fonditaj. Kelkaj el ili havas organon; la ĉeĥoslovaka: *Bulteno*, la norvega: *Arbeider-Esperantist* (Laborista Esperantisto), la pola: *Lingvo Internacia*. La danaj laboristaj esperantistoj havas propran rubrikon en la organo de la sveda LEA. En kelkaj landoj, kiel Bulgario, Italio k. s. laborista esperanto-movado ne povas ekzisti.



### c) Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT).

#### 34. Antaŭhistorieto.

Kiam en la jaro 1919 la laborista esperanta movado en diversaj landoj iom post iom reekvivis, grupo da parizaj kamaradoj klopodis restarigi la internacian asocion Liberiga Stelo (§ 21) kaj aperigis internacian gazeton *Esperantista Laboristo*.

Tiutempe multaj laboristaj esperantistoj ne havis ĝustan komprenon pri la celo kaj taskoj de la laborista esperanta movado. Liberiga Stelo montris al ili la vojon. Per serio da artikoloj en *Esperantista Laboristo*<sup>1)</sup> k-do E. Lanti (Adam) klarigis la starpunkton de Liberiga Stelo. Li akcentis, ke Esperanto por laboristoj ne povas esti celo, sed nur rimedo, ke konsekvence la laboristaj esperantistoj devas partopreni en la neŭtrala movado, sed organizi sin memstare, ke ili devas ne nur propagandi la lingvon, sed ankaŭ organizi ĝian praktikan aplikadon por laboristaj celoj, ke por tio la laboristaj esperantistoj devas unuigi sin en tutmonda organizo, kiu ne estu kungluaĵo de naciaj asocioj, sed ekster-nacia, sennacieca.

Kvankam ne ĉiuj laboristaj esperantistoj konsentis pri ĉi tiuj gvidprincipoj de Liberiga Stelo, ĉi tiu tamen kreskis kaj plifortiĝis. En aŭgusto 1921 okazis en Prago ĝia unua kongreso, kiu i. a. decidis ŝanĝi la nomon de la asocio en Sennacieca Asocio Tutmonda.

<sup>1)</sup> Ili aperis en broŝura formo sub la titolo For la neŭtralismon! Eld. de SAT. 3 eldonoj — 7000 ekz.oj.

### 35. Celo.

La celo de SAT estas:

a) utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda; b) kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de Homeca solidaro; c) lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj; ĉ) servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT; d) peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de nia Asocio.

Ĉi tiun difinon oni akceptis en la fonda kongreso de SAT en 1921 kaj ĝi restis ĝis nun valida. En 1928 oni pliprecizigis la celon per jena aldono:

SAT, ne estante politika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la *dogmiĝon* de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.

Unuvorte, SAT celas, per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias la plej rekta aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.



### 36. Organizaformo.

SAT ne aprobas la laŭnacian grupiĝon, la t. n. 'internacian' organizformon. Ĝia starpunkto estas, ke organizo de samlingvanoj ne bezonas naciajn sekciojn, kiuj por la ekzistantaj Internacioj, kies membroj estas malsamlingvanoj, estas neeviteblaj. Laboristaj esperantistoj, kiuj komprenas unu la alian, povas unuigi sin laŭ tutmonda skalo, sen la

interŝtupo: la nacia sekcio. Krome la naciaj propagandaj asocioj (LEA-oj) havas alian taskon ol la mondasocio, kiu organizas la praktikan aplikon de la lingvo. Konsistigi ĉi lastan el LEA-oj do estus ne celtrafa.

Tial SAT havas strukturon sennaciecan. Ĝiaj membroj estas interligitaj kun la centro kaj unu kun la aliaj senpere. Laŭ la statuto, laste ŝanĝita en 1932, SAT estas gvidata de Plenum-Komitato (PK) konsistanta el 6 membroj loĝantaj en la sama urbo kaj elektitaj referendumde de la tuta SAT-anaro. La PK estas helpata, konsilata kaj kontrolata de Ĝenerala Konsilantaro (ĜK). Ĉi tiu ĜK konsistas el po unu membro el ĉiu sektoro<sup>1)</sup>, unu reprezentanto de ĉiu LEA konvencie ligita (§ 44) kun SAT, la Kontrol-Komitato elektita de kongreso kaj unu reprezentanto de la SAT-anaro el la sideja urbo.

Ĉiujare SAT okazigas internacian kongreson, kiun povas partopreni ĉiu SAT-ano. Voĉdoni en ĝi rajtas nur la aktivaj membroj. Cetere pri ĉiuj proponoj findecidas referendumde la tuta aktiva membraro.

SAT havas membrojn aktivajn, aspirantajn kaj subtenantajn. Aktivaj membroj ricevas la oficialan asocian gazeton *Sennaciulo*. Ĉiu membro ricevas la Jarlibron kaj rajtas uzi la servojn de la asocio. Aktivaj kaj aspirantaj membroj havas la devon doni senpage informojn kaj helpojn por enketo, vojaĝo ktp., kondiĉe, ke tio ne kaŭzas al ili elspezojn. Por ebligi specialan agadon en faka aŭ profesia rondoj, SAT-anoj povas kuniĝi en sekcioj. Ekzistas sekcioj de instruistoj, gejunuloj, liberpensuloj kaj literaturistoj. Laŭbezone ili povas disponi pri propra rubriko en la asocia organo. Dum la kongreso ili havas sian fakkunsidon. Sekcioj laboras en la kadro de SAT kaj estas kontrolataj de la PK. Frakcioj kunigas sampartianojn kun la celo influi partiajn instancojn, organizi servojn al ili, propagandi en la partio ktp. Ili agadas ekster la respondeco de la SAT-instancoj. Ekzistas frakcioj anarkiista, komunista, bolŝevist-leninista, socialista kaj sennaciista.

<sup>1)</sup> Por kiel eble plej multe ignori la ideon de nacieco kaj landaneco, por eviti, ke ĜK-ano opiniu sin kvazaŭ reprezentanto de sia nacio aŭ lando, oni dividis la tersurfacon laŭ la 24 meridianaj horzonoj (sektoroj) laŭ kiuj oni elektas la ĜK-anojn. (Pli frue la sektora divido estis tute arbitra).





### 37. Sennacieca Revuo.

Kiam en 1921 Liberiga Stelo transformiĝis en SAT, ĝia organo *Esperantista Laboristo* alinomiĝis *Sennacieca Revuo*. Redaktoro restis k-do Lanti. SR publikigis artikolojn pri vivo kaj batalo de la laboristaro tutmonda, pri politikaj, sociaj, pedagogiaj kaj aliaj temoj, literaturaĵojn, kronikon, ktp. Krome aperis en ĝi interesaj gvidartikoloj de la redaktoro, kiuj klarigis diversajn flankojn de la asociaj starpunkto kaj agado. En ĉi tiu formo eliris SR ĝis 1924, kiam ĝi transdonis sian taskon al nova gazeto *Sennaciulo*. De tiam SR aperis kiel literatur-scienc-pedagogia organo, de 1928 sub la titolo *La Nova Epoko*. En 1933 *La Nova Epoko* ĉesis aperi kaj SR reekvivis kiel monata soci-politika literatur-sciencia organo. En ĉi tiu formo ĝi ankoraŭ nun (1936) aperas.



### 38. Sennaciulo.

La kresko de SAT en la jaroj 1923-24 kaj precipe ĝia interna plifortigo ebligis la eldonon de semajna gazeto. Ekaperis en oktobro 1924 *Sennaciulo*, 8-paĝa oficiala organo de SAT, redaktata de N. Bartelmes. Gvidanto estis k-do Lanti. Sed ĉar ĝi tiu loĝis en Parizo kaj k-do Bartelmes en Lajpcigo, ĉi tiu gvidado ne multe utilis. Ĉar krome k-do Bartelmes ankoraŭ ne havis sperton pri la redaktado kaj aliflanke la komunistaj kamaradoj multe, kaj alitendencaj kamaradoj malmulte kunlaboris, la enhavo tiutempe aspektis iom unuflanka kaj ne kontentigis ĉiujn. Pro tio kaj pro manko de mono oni anstataŭigis en 1925 k-don Bartelmes per kolektiva redaktararo konsistanta el diverstendencaj kamaradoj en Lajpcigo. Ankaŭ ĉi tio ne sufiĉe plibonigis la situacion. En 1926-27 redaktis sinsekve k-do Lanti kaj kelkaj aliaj redaktoroj, ĝis kiam en 1928 k-do Bartelmes venis en Parizon kaj iĝis denove redaktoro sub persona gvidado de k-do Lanti. De tiam S-ulo fariĝis iom post iom unu el la plej bone redaktataj gazetoj. En 1929 ĝia abonantaro atingis la nombron 4200 kaj de tiam ĝi eliris ĉiusemajne kun 12 paĝoj. Ĉi tiu bonstato ne daŭris longe. De 1930 ĝi pro financaj malfacilaĵoj aperis malpli ofte. Poste la skismo, la ekonomia krizo kaj la senlaboreco malfavore influis la staton de la gazeto kaj malebligis revenon al la antaŭa amplekso. Nuntempe (1936) S-ulo aperas regule ĉiumonate en 8 paĝoj inkluzive *La Lernanto*.



### 39. La Nova Epoko.

La literaturscienca organo de SAT komenciĝis fakte en 1923, kiam la moskvaj k-doj Demidjuk, Futerfas, Hajdovski Nekrasov kaj Polakov, kiuj eldonis revuon *La Nova Epoko*, rezignis pri ties plua eldonado kaj konsentis gvidi literatur-sciencan Aldonon de SR. Unu jaron poste, kiam ekeliris S-ulo, SR mem iĝis literatur-scienc-pedagogia organo, redaktata de k-do Demidjuk kaj Nekrasov. En 1928 ĝi alinomiĝis *La Nova Epoko*. De 1930 k-do Bartelmes prizorgis la redaktadon sub gvidado de k-do Lanti. En SR kaj *La Nova Epoko* aperis fragmentoj de kaj skizoj pri diverslandaj verkistoj, originala kaj tradukita prozo kaj poezio, artikoloj pri scienco kaj tekniko, pri pedagogiaj kaj lingvaj temoj, ktp. La aperintaj 9 jarkolektoj enhavas abundon da interesa legaĵo. La fakto, ke SAT kapablis aperigi tian revuon, montras, ke inter la laboristaj esperantistoj ne mankas literaturaj talentoj.

Pro la kriza tempo *La Nova Epoko* eliris dum 1932 intermite kun S-ulo. Aperis 6 grandformataj belaspektaj kajeroj. En 1933 reviviĝinta SR anstataŭis ĝin.



### 40. Literaturo.

Tre grava tasko de SAT estas la aperigo de bonaj, instruaj libroj. Per tio ĝi servas al la klerigo de siaj membroj kaj krome al la propagando de Esperanto. Ĝis nun SAT aperigis per la modestaj monrimedoj, pri kiuj ĝi disponis, kvindek da diversaj verkoj. La plej gravaj el ili estas la jenaj:

beletristikoj:

A. Bogdanov,	<i>Ruĝa Stelo.</i>
J. Hašek,	<i>La travivaĵoj de la brava soldato Svejk.</i>
J. London,	<i>La Fera Kalkanumo.</i>
Upton Sinclair,	<i>Jimmy Higgins.</i>
Voltaire,	<i>Kandid.</i>

sciencaj:

Reiche,	<i>El la mondbildo de la nova fiziko.</i>
Fersman,	<i>La vojo al la scienco de la estonto.</i>
"	<i>La Kemio de l' universo.</i>
E. Lanti,	<i>Naciismo (orig.).</i>

socipolitikaj:

H. Barbusse, *Eklumo en abismo.*  
Marks & Engels, *Komunista Manifesto.*  
P. Kropotkin, *Etiko.*  
Lenin, *Stato kaj revolucio.*  
G. Bastjan, *La liberecana socio.*

esperantismaj:

E. Drezen, *Zamenhof,*  
E. Lanti, *For la neŭtralismon!*  
E. Lanti, *La laborista esperantismo.<sup>1)</sup>*  
P. Neergaard, *Fremdvortoj en Esperanto.*  
Grosjean, *Plena Vortaro de Esperanto.* (2-a eld.)  
Maupin k. a.,

diversaj:

*Proletaria Kantaro.*  
*Vortoj de K-do E. Lanti.*

<sup>1)</sup> Aperis tradukita en angla, franca, germana, ĉeĥa, nederlanda kaj sveda lingvoj.



#### 41. Praktika utiligo.

SAT celas praktike utiligi Esperanton por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda. Gravan parton de tiu tasko plenumas la presorganoj de SAT, pri kies enhavo ni jam skribis aliloke. Regula legado de ĉi tiu gazetoj ne nur instruas kaj klerigas, ne nur donas scion kaj informojn, sed ankaŭ instigas al pripensado, plivastigas la rigardon ĝis trans la naciaj limoj, kutimigas la legantojn konsideri la aferojn laŭ vidpunkto tutmonda, plifortigas la senton de tutmonda solidaro. Ĉi ĉio helpas al tio, ke la membroj de SAT iĝu la plej perfektaj el la t. n. internaciistoj kaj la plej kapablaj batalantoj en la laborista movado. Ankaŭ alimaniere la SAT-gazetoj servas al la laborista movado. Multaj el iliaj artikoloj estas tradukataj de aktivaj kamaradoj en ties nacian lingvon kaj represataj en lokaj aŭ landaj laboristaj gazetoj. Inverse artikoloj aŭ alvokoj de iuj ne-esperantistaj laboristaj organizoj estas per la SAT-organoj diskonigataj tra la tuta mondo. El la jarkolekto 1923-24 de SR. aperis 146 artikoloj tradukitaj en naciaj laboristaj gazetoj, el la jarkolekto 1928-29 de Sennaciulo preskaŭ 200! Ĉi tiuj ciferoj rilatas nur la registritajn tradukojn, la realaj ciferoj devas esti pli altaj.

Per sia Jarlibro SAT havigas al siaj membroj adresojn de kamaradoj en ĉiuj landoj kaj per tio ebligas al ili reciproke interrilatadon, interŝanĝi opiniojn, spertojn kaj informojn, organizi enketojn, helpi unu la alian dum vojaĝo ktp. SAT-ano ĝuste kaj celtrafe utiligante ĉi tiun ilon povas akiri per ĝi valorajn informojn el la tuta mondo kaj fari gravajn servojn al siaj partia, sindikata aŭ kultura organizoj.



#### 42. Sennaciismo.

La sennaciismo estas soci-politika teorio, laŭ kiu la nacioj devas rezigni pri sia sendependeco kaj siaj lingvaj kaj kulturaj apartaĵoj por kunfandiĝi en iun mondskalan unuon kaj kiu rekomendas al la laboristoj nenial partopreni en militoj por nacia sendependiĝo. Ĉi tiu teorio, kies premiso estas la ekzistado de mondlingvo, estas plejparte formulita de k-do Lanti kaj trovis ĝis nun siajn adeptojn nur inter la membroj de SAT. Tamen, SAT mem, kvankam estante sennacieca laŭ sia organiza strukturo, neniel akceptas la sennaciismon kiel oficialan soci-politikan teorion. Ĉi tio ja estus kontraŭa al ĝia superpartieca karaktero. Sed ĉar la sennaciistoj agnoskas la klasbatalon, ili havas en SAT la samajn rajtojn kiel aliaj klasbatalaj tendencoj. La frakcio de sennaciistoj eldonis Manifeston de Sennaciistoj, en kiu estas klarigata ĉi tiu teorio. K-do Lanti, la gvidanto de la Sennaciista Frakcio, eldonas trimonatan revueton *Herezulo*, kiu servas kiel organo de tiu Frakcio.



### 43. Kongresoj.

Sekva numero	Loko	Dato	Nombro da partoprenantoj	Nombro da landoj reprezentitaj
1-a	Prago . . . . .	1-3 aŭg. 1921	ĉ. 80	15
2-a	Frankfurto ..	12-16 aŭg. 1922	ĉ. 230	12
3-a	Kaselo (Cassel)	11-15 aŭg. 1923	ĉ. 250	18
4-a	Bruselo . . . . .	14-18 aŭg. 1924	ĉ. 90	14
5-a	Vieno . . . . .	11-15 aŭg. 1925	ĉ. 150	7
6-a	Leningrado ..	6-10 aŭg. 1926	ĉ. 400	14
7-a	Liono (Lyon) .	12-16 aŭg. 1927	ĉ. 200	15
8-a	Gotenburgo ..	14-18 aŭg. 1928	ĉ. 400	24
9-a	Lajpcigo ....	4-10 aŭg. 1929	ĉ. 650	22
10-a	Londono ....	3-7 aŭg. 1930	ĉ. 340	16
11-a	Amsterdamo .	2-7 aŭg. 1931	ĉ. 400	14
12-a	Stutgarto ....	6-11 aŭg. 1932	ĉ. 245	12
13-a	Stokholmo ..	5-10 aŭg. 1933	ĉ. 600	16
14-a	Valencio ....	3-8 aŭg. 1934	ĉ. 370	13
15-a	Parizo . . . . .	3-7 aŭg. 1935	ĉ. 340	15
16-a	Manĉestro ....	2-7 aŭg. 1936	ĉ. 170	7

### DETALOJ.

Honorprez. H. Barbusse. Malakcepto de neŭtraleca starpunkto.

Honorprez. Romain Rolland. Pliseverigo de la kondiĉoj pri membreco.

Honorprez. pro A. Einstein (Ajnštajn). Propono pri komunistigo de SAT farita de SEU-anoj estas reprenata.

Honorprez. E. Toller. Malpliseverigo de la kondiĉoj pri membreco. Rekomendo uzi en SAT-eldonaĵoj simplan stilon.

Decido ke SAT restos supertendeca. Malaprobo pri futurismaj lingvaj eksperimentoj. Komisiono por SAT-programo.

Honorprez. popolkomisaro Lunaĉarski. Raportoj pri Esp. en lernejoj kaj lab. kluboj, Esp. kaj radio, Internacia Lab. korespondado. Tezoj pri rilatoj inter SAT kaj LEA-oj. Sovetia poŝto eldonas SAT-poŝtmarkon.

Rilatoj kun LEA-oj. Program-projekto. Ĝi ne estos deviga.

Konvencio inter SAT kaj LEA-oj. Akcentado de la kultura, eduka, nepolitika kaj kontraŭdogma karaktero de SAT.

Kritiko de komunistaj SAT-anoj pri laŭ ili neklasbatala, oportunisma gvidado de SAT kaj pri la broŝuro La Laborista Esperantismo. Likvido de la program-komisiono. Deviga abono al S-ulo por aktivaj membroj.

SEU bojkotas la kongreson per intenca neĉeesto de sovetianoj. Diskuta batalo inter komunistaj partianoj unuflanke kaj la SAT-gvidantoj kun ĝiaj aprobantoj aliflanke.

Komunista opozicio sensukcese klopodas akiri la gvidadon de SAT. Skismo. Opozicio forlasas la kongreson. SAT restos nepartieca.

Malaprobo pri propono fari el SAT iun Internacion. Ŝanĝo de statuto tiel, ke LEA-oj havu reprezentanton en la ĝenerala konsilantaro.

Malaprobo de la fondo de ISE. Sukcesa altlernejo laborista esperantista.

Rezolucio pri reunuiĝo de la laborista esperanta movado.

Diskuto pri la reunuiĝo. Delegitaro al IPE-kongreso en Antverpeno.

Esperanto en la lernejoj. Reunuiĝo devos okazi en la kadro de SAT. SAT-anoj agadu kontraŭ la plidisvastiĝanta ŝovinismo.

#### 44. Rilatoj kun LEA-oj.

En la unuaj jaroj ne estis iuj fiksitaj reguloj pri la rilatoj inter SAT kaj la LEA-oj. Oni laŭbezone interrilatis unu kun la alia, sed sistema kunlaboro ne okazis.

Pro tio estiĝis en 1928 t.n. „Konvencio”, kiun aprobis samjare la Gotenburga kongreso.

Laŭ ĉi tiu Konvencio la LEA-oj prizorgu la propagandon kaj SAT la praktikan, aplikan laboron, la LEA-oj eldonu la nacilingvaj kaj dulingvaj publikigaĵojn kaj SAT la esperantlingvaj; laŭeble en ĉiu LEA-sekcio estu organizata SAT-rondo, kiu prizorgu la SAT-laboron kaj SAT-propagandon; SAT donu al LEA-oj spacon en sia gazeto Sennaciulo kaj LEA-oj faru la samon al SAT en siaj gazetoj; la LEA-oj elektu unu el siaj estraranoj kiel konsultan membron de la SAT-gvidantaro.

Iom post iom preskaŭ ĉiuj LEA-oj subskribis ĉi tiun Konvencion. En 1931 SEU kaj la germana LEA rompis ĝin per sia kontraŭ-SAT-a agado. (§ 45.) Ankaŭ kelkaj aliaj LEA-oj ne tute agis laŭ ĝi, eldonante esperantlingvajn librojn, kies publikigo laŭ la Konvencio apartenas al SAT.

Nuntempe SAT havas amikajn rilatojn kun LEA-oj en Ĉeĥoslovakio, Danio, Nederlando, Norvegio, Polio kaj Svedio.



#### 45. La skismo.<sup>1)</sup>

Ĝis 1930 la laborista esperantistaro estis pli malpli unuece organizita. Lokaj grupoj, LEA-oj kaj SAT estis neŭtralaj rilate al la diversaj klasbatalaj tendencoj. La solaj esceptoj estis: kelkaj (malmultaj) grupoj unutendencaj, la Aŭstria Laborista Ligo Esperantista (ALLE), kiu montris preferon por la socialdemokrata movado, la Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), kiu estis komuniste gvidata kaj la anarkiista Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj (TLES). Ĉar tamen ALLE kaj SEU ambaŭ akceptis membrojn de ĉiuj politikaj direktoj kaj TLES ne havis multan influon, oni povas diri, ke ĝenerale la laboristaj esperantistoj diverstendencaj loke, lande kaj tutmonde estis unuiĝintaj en la sama(j) organizo(j).

Ĉi tiu situacio ekaliĝis, kiam en 1930 unu el la plej fortaj LEA-oj, la germana, en sia kongreso en Essen faris kelkajn

<sup>1)</sup> Por detaloj oni legu: *Historio pri la skismo*. Eld. SAT, 1935.

decidojn, per kiuj ĝi direktis sin al unu difinita politika tendenco. Ĉi tiuj decidoj signifis forlason de ĝia ĝiŝtiam superpartieca starpunkto kaj ideologian alproksimiĝon al la komunista movado. Samtempe la gvidado de la asocio transiris tute en la manojn de komunistaj kamaradoj. Pro tio multaj membroj ne plu sentis sin hejme en la asocio kaj sekve de tio la laborista esperanta movado en Germanio disiĝis laŭ politikaj tendencoj.

Estas kompreneble, ke la opinioj, laŭ kiuj la komunistaj esperantistoj en la germana LEA aliĝis ties ideologian bazon kaj starpunkton, ankaŭ influis la sintenon de tiuj kamaradoj rilate al SAT.

Efektive iuj SAT-anoj, precipe la Centra Komitato de SEU (CKSEU) kaj la estraro de la germana LEA jam dum kelka tempo multe kritikis la SAT-direkcion. Poste ĉi tiu kritiko plifortiĝis, ĝis fine ĝi ekhavis la karakteron de opozicio. Ĉi tiu opozicio i. a. direktis sin kontraŭ la sennaciismo, Ĝi nomis ĉi tiun teorion reakcia, nemarksista, neklasbatala kaj ne povis toleri, ke kelkfoje, kvankam malofte, aperis en SAT-organoj artikoloj verkitaj laŭ vidpunkto de tiu tendenco. Krome ĝi kulpigis la direkcion kaj precipe k-don Lanti pri reviziado de la SAT-principoj, pri malrespekto al la statuto, pri malamikeco al Sovetio ktp.

Estis facile al la direkcio montri la senbazecon de ĉi tiuj asertoj, estis facile pruvi, ke ne la direkcio reviziis ion, sed la opoziciuloj, kiuj cetere jam en 1923 malaprobis la starpunkton de SAT kaj aprobis ĝin nur kiel provizoran revolucionan faktoron (Deklaro de SEU, marto 1923) kaj en la sama jaro (kongreso en Kaselo) proponis fari el SAT komunistan organizon.

Kvankam la pravo do estis ĉe la flanko de la direkcio, ĉi tiu en la batalo por defendo kaj gardo de la fundamentaj SAT-principoj, estis en malfavoraj kondiĉoj. Estis gravaj monaj malfacilaĵoj kaŭzita de la fakto, ke granda sumo da mono (ĉ. 12000 g.m.) apartenanta al SAT kaj deponita ĉe CKSEU en Moskvo, kiu ĝis tiam estis peranto inter SAT kaj la soveta SAT-anaro, ne povis esti transsendata al SAT. Laŭ diroj de CKSEU la kaŭzo estis, ke la financkomisaro limigis la eksporton de mono al eksterlando. La direkcio ne volis akcepti ĉi tiun klarigon kaj emis kredi, ke CKSEU iel kulpas pri la reteno de la mono. Kia ajn estu la afero, oni devas konstati, ke CKSEU ne favoris la trans-

pagon. Ĝi ne serioze klopodis plenumi la instrukciojn de la direkcio pri presigo de libroj en Moskvo por tiel malpliigi la ŝuldon al SAT. Kiam poste estiĝis la eblo pagi la monon per rubloj pere de la Moskva filio de *Neudrag*, la ĉefa kreditoro de SAT, oni ne faris ĝin. Oni ankaŭ ne sendis al SAT la grandan kvanton da libroj, jam pli frue presitaj en Moskvo kaj apartenantaj al SAT. Ĉi tiuj faktoj ja pravigas la supozojn de la direkcio. Cetere oni poste klopodis defendi la agadon de CKSEU pretekstante, ke la mono fakte apartenas al tiuj SAT-anoj, kiuj malaprobis la direkcian gvidadon.

Efektive la opoziciaj gvidantoj, precipe CKSEU, batalis kontraŭ la direkcio per nehoneŝtaj rimedoj. Kiam la direkcio, ne ricevante kotizojn kaj abonmonojn el Sovetio, estis devigita ĉesigi la liveron de SAT-eldonaĵoj al tieaj kamaradoj, oni riproĉis al ĝi, ke ĝi intence faris tion!

CKSEU atingis, ke la eniro de la SAT-organoj en Sovetio estis malpermesata. Per tio eĉ kelkaj unuopaj gazetoj sendataj tien, por konigi al Sovetianoj la starpunkton kaj la argumentojn de la direkcio, ne trafis la adresitojn. Tiel ja estas facile kredi al la membraro de SEU per malveraj asertoj kaj falsaj kulpigoj, ke la direkcio estas friponaro! Post la Londona kongreso, kiu aprobis la gvidadon de la direkcio, la opozicio organizis sin. Ĝi aperigis propran gazeton *Internaciisto*, organo de la klasbatala esperantistaro kaj ties opozicio en SAT, kaj fondis Eldon-Kooperativon por Revolucia Esperanto-Literaturo (EKRELO). Poste ĝi stariĝis t. n. Interligan Oficejon de la klasbatala SAT-opozicio, organizis referendumon pri malfido al la direkcio (!) kaj alvokis al bojkoto de SAT per malabono kaj nekunlaborado al ĝiaj organoj. Plie oni preparis la organizadon de kongreso por fondi novan revolucionan tutmondan organizon.

Responde al tio, por defendi SAT kontraŭ tiuj atencoj, la direkcio ekigis la gvidantojn de la opozicio kaj la subskribintojn de la opozicia (bojkota) deklaro.

En la 11-a SAT-kongreso en Amsterdamo 1931 la opozicio suferis plenan malvenkon. Malgraŭ ĝiaj grandaj bruado kaj insultado, la plimulto aprobis la direkcian gvidadon. Post ĉi tiu kongreso okazis ankoraŭ referendumo, kiu kun 877 voĉoj por kaj 171 kontraŭ esprimis sian fidon al la direkcio.

★

#### 46. SAT post la skismo.

Estas kompreneble, ke perdo de ĉ. 12000 germanaj markoj, de granda stoko da libroj, de ĉ. 2000 sovetiaj membroj kaj abonantoj, de kvanto da opoziciaj membroj en kelkaj landoj kaj de multaj membroj, kiuj pro senlaboreco ne plu povis pagi kotizon kaj abonomonon, grave malutilis al la funkciado de SAT.

Sed venis ankoraŭ aliaj malhelpoj! La fondiĝo de ISE (§ 49), la detruo de la laborista esperanto-movado en Aŭstrio kaj poste en Germanio kaŭzis denove perdojn de membroj kaj abonantoj. Ankaŭ la libro-vendado en tiuj landoj tute malebliĝis. Malgraŭ ĉi ĉio SAT restis vivanta. Ĝi ne nur evitis bankroton, sed eĉ sukcesis daŭrigi la aperigon de siaj gazetoj, reeldoni la jarlibron, publikigi kelkajn novajn verkojn kaj regule okazigi sian kongresojn. La membraro nun reprezentas ankoraŭ 32 landojn! Ĝiaj gazetoj *Sennaciulo*, 6-paĝa, kun aldono *La Lernanto*, 2-paĝa, kaj *Sennacieca Revuo*, 16-paĝa, aperas regule. Ĉi tio atestas pri la grandaj vivoforto kaj laborkapablo de SAT.

La okazaĵoj en Germanio necesigis la translokigon de la administrejo kaj la librostokon al alia lando. Ĝi transiris al Parizo, kie nun k-do Bartelmes redaktas la SAT-organojn kaj prizorgas administrajn aferojn. K-do Lanti, kiu de la fondiĝo de SAT estis ĝia gvidanto, en 1933 rezignis pri sia posteno. Ankaŭ la aliaj SAT-estraranoj deziris ekŝiĝi. Sed ĉar estis neeble trovi novan estraron en alia loko, la ĝistiamaj estraranoj fine konsentis resti. La sidejo de SAT do restis en Parizo. Anstataŭ k-do Lanti, funkciis kiel prezidanto ĝis 1935 k-do H. German kaj poste k-do Banmer.

La starpunkto de la SAT-anoj rilate al la nuna organiza situacio estas la jena:

La principoj, kiuj en 1921 gvidis la fondintojn de SAT validas ankoraŭ nun. Sendube oni povas per kunigo de la LEA-oj en iu Internacio kolekti iom grandan membraron. Sed ĉu tiuj LEA-anoj, kiuj neniam havis sufiĉe da intereso por tutmonda organizo, per tiu internacia kunigo fariĝos aktivaj laborantoj sur tutmonda kampo? La SAT-anoj opinias, ke ne. Ili opinias, ke eĉ estus danĝero, se la bedaŭrinde en ĉiu LEA troviĝanta kvanto da neaktivaj membroj povus influu la gvidadon de la tutmonda movado. Krome ili konstatas, ke ĝis nun neniu sukcesis pruvi per logikaj argu-

mentoj, ke la internacia organizformo por esperantistoj, por samlingvanoj estas pli taŭga ol la sennacieca.

Aliflanke la laborista esperanta movado, malgraŭ la sukcesoj ĝis nun atingitaj kaj parte ŝuldataj al SAT, ankoraŭ ne havas multe da influo. Necesas ankoraŭ streĉi ĉiujn fortojn, necesas ankoraŭ nun, same kiel en 1921, ke ĉiuj esperantistoj, anoj de diversaj klasbatalaj organizoj, ariĝu en unu solan asocion por montri al la proletaro, per imponaj faktoj, kiom utilega estas Esperanto por la batalo kontraŭ la kapitalista sistemo.<sup>1)</sup> Ankoraŭ nun la diverstendencaj esperantistoj kune en unu organizo povos pli multe fari por Esperanto kaj pli bone utiligi ĝin por la laborista klaso, ol aparte laŭtendence organizitaj.

Esperantistoj de ĉiuj tendencoj trovas en SAT okazon kune labori por Esperanto kaj per Esperanto servi ĉiu al sia tendenco. Ĉi ĉiuj faktoj pravigas la pluan ekzistadon kaj pluan agadon de SAT.

La 14-a kongreso de SAT en Valencio 1934 faris alvokon por restarigi la unuecon de la laborista esperanta movado. Poste IPE faris proponon pri unuecfronta agado. La 15-a kongreso en Parizo 1935 sendis 3-personan komisionon al la IPE-konferenco en Antverpeno. Okazis intertraktoj inter SAT kaj IPE, sed ili restis senrezultaj, ĉar la starpunktoj de ambaŭ organizoj tro multe diferencis. En la Gvidrezolucio de la 16-a kongreso, Manĉestro 1936, estis dirata la jeno: „La kongreso estas konvinkita, ke la ĝis nun aplikitaj gvidprincipoj estas la sole ĝustaj, kaj ke nur irante sur tiu vojo ni povos servi utile nian idealon. La strukturo de nia organizo estas la plej celkonforma por nia movado.

Konsekvence, la kongreso ree alvokas al ĉiuj klaskonsciaj laboristaj esperantistoj, al kiu ajn tendenco ili apartenas, ke ili ariĝu kaj trovu sin hejmece en Sennacieca Asocio Tutmonda”.

<sup>1)</sup> Gvidrezolucio SAT-kongreso 1921



## Ĉ) Aliaj organizoj.

### 47. Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE).

El la SAT-opozicio (§ 45) naskiĝis t. n. Internacia Unuiga Komitato por la Proleta Esperanto-Movado. Ĉi tiu organizis en aŭgusto 1932 en Berlino internacian kongreson, kie fondiĝis la Internacio de Proleta Esperantistaro.

La celo de IPE estas: servigi la internacian planlingvon Esperanto al la klasbatalo de la tutmonda proletaro kaj al la socialisma konstruado; unuigi, organizi kaj gvidi ĉiujn proletajn Esperanto-organizaĵojn kaj esperantistojn sur bazo de la revolucia klasbatalo, de la dialektika materialismo, de proleta internaciismo; evoluigi kaj pliriĉigi la teorion, teknikon kaj aplikon de la internacia planlingvo.

IPE konsistas el landaj laboristaj esperantistaj asocioj (LEA-oj) kaj t. n. landaj unuigaj komitatoj. Ĉi lastaj funkcias en kelkaj landoj, kie la ekzistantaj LEA-oj ne konsentas aliĝi al IPE. Ili opozicias en la LEA-oj kaj klopodas akiri la gvidpostenojn. Se ilia agado en la LEA-o ne sukcesas, ili starigas propran landan organizaĵon.

IPE estas gvidata de Plenum-Komitato (PK). Ĉi tiu havas i. a. kontrolan rajton rilate al la funkciado de la laboro de siaj landaj sekcioj, ĝis kunvoko de eksterordinara landa kongreso. La plej alta instanco estas la mondkongreso. En ĉi tiu kongreso nur la delegitoj de la naciaj sekcioj havas decidan voĉon.

Laŭ raporto en la fonda kongreso de IPE, ĉi tiu reprezentis 13.000 LEA-anojn en 18 landoj. Grandan plimulton el ĉi tiuj liveris ĝiaj sekcioj en Sovetio (SEU) kaj Germanio (LEA). En Francio kaj Britio parto de la laborista esperantistaro aliĝis al IPE. En Nederlando kaj Svedio ĝia influo estas tre malgranda. En kelkaj aliaj landoj estas LEA-oj nefonditaj de la Internacia Unuiga Komitato por havigi al IPE la necesajn landajn sekciojn.

Organo de IPE estis la gazeto *Internaciisto*, starigita en oktobro 1930 de la tiama SAT-opozicio. Ĝi estis duonmonata, sed ne eliris tute regule. Ĝia eldonkvanto estis en la mezo de 1932 ĉ. 2700 ekz.oj.

Ĉe IPE aperis ankaŭ dumonata revuo *La Nova Etapo*, dediĉita al literaturo, sociologio kaj scienco.

La eldonejo de IPE estas EKRELO, starigita jam en 1930. Ĝi aperigis relative grandan kvanton da literaturo,

ĉefe malmult-paĝajn broŝuretojn plejparte kun komunista aŭ sovetia tendenco. Oni rajtas supozoj, ke ĝi kapablis eldoni tiom da verkoj, ĉar ĝi povis disponi pri la granda monsumo apartenanta al SAT kaj ne repagita al ĝi de CKSEU (§ 44). La cetera laboro de IPE estas ĉefe la t. n. PEK-agado (PEK = Proleta Esperanta Korespondado). PEK-centro kaj PEK-filioj peras la korespondon inter diverslandaj neesperantistaj laboristaj organizoj (fabrikokomitatoj, sindikatoj, Int. Ruĝa Helpo, partiĉeloj, redakcioj k. s.), dissendas kaj tradukas artikolojn, ktp. Ĉi tiu agado precipe rilatas al komunistaj aŭ komunistemaj organizoj.

La sidejo de IPE estis en Berlino. Kiam en 1933 Hitler prenis la regadon, ankaŭ IPE suferis la sekvojn de tio. Ĝia oficejo estis fermata kaj ĝia posedaĵoj konfiskataj; kelkaj el ĝiaj funkciuloj estis arestataj; aliaj sukcesis forkuri. *Internaciisto* ne plu povis aperi. De tiam ĝis 1934 la *Bulteno de SEU*, sub la titolo *Sur Posteno* servis kiel organo de IPE. Poste *Sur Posteno* iĝis memstara gazeto de IPE. Kelkan tempon ĝi eliris en Amsterdamo, kie ankaŭ estis la librovendejo de IPE. Nuntempe la redakcejo-administrejo estas en Francio, la IPE-Oficejo en Britio kaj la IPE-Centro en Leningrado.

IPE okazigis internaciajn konferencojn en Lille (Francio) 1934 kaj Antverpeno (Belgio) 1935. Ĉi lastan ĉeestis 129 gekamaradoj el 13 landoj.

IPE multe klopodas por starigo de t. n. unuec-fronto de la laborista esperantistaro, sed ĝis nun oni ne trovis komunan platformon, kiu ebligus la realiĝon de ĉi tiu ideo.

★

#### **48. Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj (TLES).**

En 1924 kelkaj anarkiistaj SAT-anoj, kiuj opiniis, ke SAT estas tute sub influo de la Komunista Internacio kaj ne prezentas al ili sufiĉe da eblo por propagandi siajn ideojn kaj utiligi la SAT-aparaton por siaj celoj, starigis propran organizon, la Tutmondan Ligon de Esperantistaj Senŝtatanoj. La celon de ĉi tiu organizo oni formulis jene: 1) Servi per dokumentizo (raportoj, artikoloj, libroj, broŝuroj, revuoj, ktp.) ĉiujn anarkiistajn aŭ proksimajn al anarkiistaj laŭ sia taktiko organizojn, 2) disvastigi anarkiismon per enpresado de pri-anarkiismaj artikoloj en esperantaj laboristaj gazetoj;

3) servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj anarkiistaj aŭ similaj organizoj.

Ĉe la starigo de TLES kelkaj anarkiistaj SAT-anoj transiris al tiu tendenca organizo. En la postaj jaroj fondiĝis TLES-grupoj en kelkaj urboj i. a. en Amsterdamo, Berlino, Liono, Manhajmo (Mannheim), Parizo, Stokholmo.

En 1925 TLES ekeldonis monatan gazeton *Libera Laboristo*. Ĉi tiu tamen aperis ne tute regule kaj mortis en 1931.

En 1933 TLES eldonis kun la Internacia Laborista Asocio (anarkiema sindikata Internacio en Berlino) Informservon. TLES ne sukcesis akiri multan influon. Ŝajne la nombro da anarkiistaj esperantistoj ne estas sufiĉe granda por bone viviĝi propran organizon. Sekve de tio sufiĉe multaj anarkiistaj kamaradoj realiĝis al SAT.

En la lastaj jaroj anarkiistaj kamaradoj havas propran gazeton *Laboristo*, fondita de bulgaraj kamaradoj kaj nun eldonata de la Anarkiista Esperanto-Grupo en Stokholmo. Ĝi eliras ĉiumonate je 700 ekzempleroj.

En Japanio oni eldonis en 1930-31 gazeteton *La Anarkisto*. Pro aresto de la kamaradoj-eldonintoj ĝi ĉesis aperi.

En Hispanio funkcias(-is?) Iberia Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj, kiu unuigis hispanajn kaj portugaliajn esperantistojn. Ĝi i. a. prizorgis la esperantlingvan eldonon de *Informa Bulteno* pri la okazintaĵoj en Hispanio en 1936, aperigita de la Nacia Konfederacio de Laboro kaj la Iberia Anarkiista Federacio.

★

#### **49. Internacio de Socialistaj Esperantistoj (ISE).**

La aŭstria laborista Esperanto-organizo ALLE neniam multe simpatiis al SAT. Ĝi ne aprobis i. a. ties sennaciecan organizformon, sed preferis *Internacion* konsistantan el naciaj asocioj. Kvankam ĝi subskribis la *Konvencion de Goteborgo*, ĝi neniam faris ion favore al SAT.

Tiom longe, kiom SAT bone prosperis kaj havis amikajn rilatojn kun la plej gravaj LEA-oj, ALLE montris nur pasive sian malaprobion. Sed post la en 1931 okazinta skismo en la laborista esperanto-movado, ALLE ekklopodis efektiviĝi siajn ideojn pri internacia organizado. En la 12-a SAT-kongreso en Stutgarto 1932 aŭstriaĵaj membroj de SAT proponis ŝanĝi la sennaciecan strukturon de SAT kaj fari

el ĝi internacian organizon. Ĉi tiun proponon oni malakceptis.

ALLE daŭrigis. Ĝi sukcesis varbi por sia ideo pri internacia organizado du najbarajn LEA-ojn, la hungaran kaj la ĉeĥan. Ankaŭ en iuj aliaj landoj estis kelkaj kamaradoj, kiuj samopiniis kun ĝi. Ĉi ĉiuj kune starigis en aprilo-majo 1933 novan internacian organizon, la Internacion de Socialistaj Esperantistoj (ISE).

Laŭ sia statuto ĝi celas: propagandi Esperanton inter socialistoj kaj socialismon inter esperantistoj, meti Esperanton kaj sian aparaton en la servon de la ĝenerala laborista movado, organizita en la Socialista Laborista Internacio, la Libera Sindikata Internacio kaj la socialistaj kultur-Internacioj. Por tiu celo ĝi faras ĉiuspecajn propagandlaborojn en la servo de la internacia proletaro, klopodas arigi ĉiujn socialistajn esperantistojn en siaj vicoj, aranĝas internaciajn kongresojn kaj renkontiĝojn, subtenas al kaj kontaktadas kun la laboristaj unuiĝoj, kiuj staras sur la bazo de internacia klasbatalo, kaj eldonas gazetojn, librojn, broŝurojn k. s. celtaŭgajn. La strukturo de ISE estas jena: internacia centro, landaj sekcioj, lokaj grupoj kaj individuaj membroj.

Ĉi tiu Internacio havas same kiel IPE partian tendencon. Ĝia estiĝo signifis denovan skismigon de la laborista esperanta movado. Kaj ĉar ĝi konsistas el landaj sekcioj, ĝi kaŭzos ankaŭ skismon en la landaj organizoj.

Kelkaj LEA-oj, i. a. la nederlanda kaj la sveda, forte malaprobis la agadon de la starigintoj de ISE. Ankaŭ la Socialista Frakcio esprimis sian malaprobon pri ĉi tiu skismo. Per la likvidiĝo de ALLE en 1934 (§ 25) ISE perdis sian ĉefan bazon. Ĝi tamen restis funkcia kaj havas nun sekciojn aŭ reprezentantojn en deko da landoj. Ĝia sidejo estas en Nederlando. La organo de ISE estas *La Socialisto*, la iama gazeto de ALLE. Redaktejo kaj eldonejo en Francio.

ISE eldonis ĝis nun: *ISE-kalendaro* 1934 kaj la verkon *Leteroj al Brigito*, de J. B. Severas.

★

## 50. Internacia Federacio de Esperantista Trafik- kaj Transportlaboristaro (IFETT).

La Internacia Federacio de Esperantista Trafik- kaj Transportlaboristaro (IFETT) distingas sin de la aliaj laboristaj esperanto-organizoj per tio, ke ĝi estas faka, profesia organizo.

IFETT estas kvazaŭ ido de la Internacia Transportlaborista Federacio (ITF). En la estraro kaj membraro de ĉi tiu organizo regis favoraj opinioj rilate al Esperanto. La kongresoj de ITF kaj de la al ĝi aliĝintaj sindikatoj plurfoje esprimis sian simpatian al nia lingvo. ITF eldonas de 1930 siajn *Komunikojn por la Gazetaro* ankaŭ en Esperanto.

Sed la ITF-anoj-esperantistoj opiniis, ke por la plia disvastigo de Esperanto inter la transportlaboristoj tre utilis aparta organizo, kiu en intima rilato kun ITF kaj la cetera laborista esperanta movado laborus precipe en la rondoj de ITF-anoj.

Post kelkaj senrezultaj klopodoj ili fine en aŭgusto 1931 sukcesis starigi la celitan organizon. Tiel fondiĝis IFETT. Ĝia organiza formo baziĝis sur la principo de kolektiva membreco; ĝi do konsistas el landaj sekcioj. Kie ankoraŭ mankas landa sekcio, funkcias t. n. „asesoro“, kies tasko estas prepari la starigon de landa sekcio. Kiel internacia instanco de IFETT funkcias Internacia Oficejo, kiu laboras en kontakto kun ITF. Landaj sekcioj kaj asesoroj laboras laŭeble en kontakto kun la naciaj sindikatoj.

IFETT havas sekciojn aŭ asesorojn en 19 landoj. Kiel ĝia organo servas la jam nomitaj *Komunikoj por la Gazetaro*, eldonataj de ITF.

Krom la propagandon por Esperanto inter la trafik- kaj transportlaboristoj, IFETT prizorgas ankaŭ la aranĝon de reciprokaj vizitoj de IFETT-anoj el unu lando al tiuj de alia lando kaj la organizadon de internaciaj konferencoj. La sidejo IFETT estas en Nederlando.

★



## **DEMANDARO**

### **pri lingvo, historio kaj movado.**

Por faciligi al la studentoj la kontrolon pri tio, ĉu oni bone encerbis la plej gravajn faktojn menciitajn en ĉi tiu libreto, ni donas ĉi tie kvanton da demandoj pri la pritrakitaj temoj.

Eble ili ankaŭ taŭgas por daŭrigaj kursoj kaj konversaciaj kunvenoj, kiam oni pritraktas la historion kaj movadon. La numeroj de la paragrafoj indikas la ĉapitron, pri kiu temas la sekvontaj demandoj.

- § 1. 1. Kiuj estis la unuaj scienculoj, kiuj okupis sin pri la ideo de mondlingvo?  
2. Kiuj estis la unuaj, kiuj publikigis projektojn de mondlingvo?  
3. El kio konsistis ĉi tiuj unuaj projektoj?  
4. Kiel oni nomas la lingvo-sistemojn, kiuj ne estas paroleblaj?  
5. Kio estas lingvo aposteriora?
- § 2. 6. Kiu estis la unua pli malpli uzebla mondlingvo?  
7. Kiu estis ĝia aŭtoro?  
8. Kiam li publikigis ĝin?  
9. Sur kiuj principoj Volapuko estis bazita?  
10. El kiu lingvo estis prenita ĝia vortmaterialo?  
11. Kion signifas „Volapük“?  
12. Kial Volapuko ne sukcesis?  
13. Kiom da volapukaj kongresoj okazis?  
14. Ĉu oni parolis volapuke en tiuj kongresoj?  
15. Kio okazis en la volapuka movado post ĝia lasta kongreso?  
16. Kiom da gazetoj aperis en kaj pri Volapuko?
- § 3. 17. Kiu estas la aŭtoro de Esperanto?  
18. Kiam kaj kie li naskiĝis?  
19. Kion vi scias pri lia vivo?  
20. Kiam kaj kie li mortis?  
21. Kion li celis per sia lingvo?  
22. Kiam li publikigis sian projekton?
- § 4. 23. El kiu lingvo-grupoj devenas la materialo de Esperanto?  
24. Laŭ kiu principo d-ro Zamenhof elektis la vortojn por sia lingvo?  
25. Kion signifas: „principo de internacieco“?

- § 5. 26. Kiu verkis la *Fundamenton de Esperanto*?  
 27. El kiuj partoj ĝi konsistas?  
 28. Kial oni ne povas ŝanĝi la Fundamenton?  
 29. Kiu kongreso akceptis la Fundamenton kiel „netuŝeblan” bazon de Esperanto?  
 30. Kio estas la Aldonoj al la Fundamento?
- § 6. 31. Ĉu la netuŝeblo de la *Fundamento* kaŭzas, ke Esperanto ne povas disvolviĝi?  
 32. Ĉu Esperanto ne ŝanĝiĝas?  
 33. Kiel do evoluas Esperanto?
- § 7. 34. Kiu kongreso akceptis la *Deklaron pri esperantismo*?  
 35. Kio estas esperantismo laŭ tiu Deklaro?  
 36. Al kiu apartenas Esperanto?  
 37. Kio estas esperantisto?
- § 8. 38. Kiujn metodojn de esperanto-instruo vi konas?  
 39. Kiu ellaboris la Ĉe-metodon?  
 40. Ĉu nur Andreo Ĉe povas instrui laŭ tiu metodo?  
 41. Kiu (kio) zorgas pri la organizado kaj disvastigado de la Ĉe-metoda instruo?
- § 9. 42. Kiuj estis la unuaj pioniroj de Esperanto?  
 a) en Rusio; b) en Germanio.  
 43. Kiu estis la unua esperanta gazeto?  
 44. Kiu redaktis ĝin?  
 45. Pro kio ĝi mortis?  
 46. Kiu gazeto anstataŭis ĝin?  
 47. Kiu estis grava pioniro de Esperanto en Francio?  
 48. Kiujn aliajn eminentajn esperantistojn el la antaŭmilita periodo vi konas?  
 49. Kion faris la firmo Hachette en nia movado?
- § 10. 50. Kie kaj kiam okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto?  
 51. Kiom da esperantistoj ĉeestis ĝin?  
 52. Kiu faris la malferman paroladon en la kongresoj ĝis 1913?  
 53. Kio estis la ĉefa temo en multaj kongresoj?  
 54. Kio estas Somera Universitato?  
 55. En kiuj urboj okazis kongresoj?  
 56. Kie okazis la lasta kongreso?

- § 11. 57. Kiu starigis la Centran Officejon?  
 58. Ĉu ĝi estis oficiala institucio?  
 59. Kie estis ĝia sidejo?  
 60. Kion ĝi eldonis?  
 61. Ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas?
- § 12. 62. Kio estas la Lingva Komitato?  
 63. Kie kaj kiam oni starigis ĝin?  
 64. Kio estas ĝia tasko?  
 65. Ĉu la LK plibonigas la lingvon?  
 66. Kiuj elektas la LK-anojn?  
 67. Kio estas la Akademio?  
 68. Kiom da membroj ĝi havas?  
 69. Kiuj sekcioj el Akademianoj ekzistas?  
 70. Kiuj estas la organoj de la LK kaj la Akademio?
- § 13. 71. Kiam estiĝis la *Kontrakto de Helsinki*?  
 72. Kion ĝi celis?  
 73. Kiel la movado estis organizita laŭ ĉi tiu kontrakto?  
 74. Kio estis la Konstanta Reprezentantaro?  
 75. Kio estis la *Internacia Centra Komitato*?  
 76. Kiam oni likvidis la Kontrakton de Helsinki?  
 77. Kial oni likvidis ĝin?
- § 14. 78. Kiam oni akceptis la *Interkonsenton de Kolonjo*?  
 79. Kiun taskon ricevis UEA per tiu Interkonsento?  
 80. Kiun sanĝon en la organiza strukturo de UEA kaŭzas la Interkonsento?  
 81. Kiu nova gvidinstanco kreiĝis per la Interkonsento?
- § 15. 82. Kion faras la naciaj esperanto-organizoj?  
 83. Ĉu ekzistas nur neŭtralaj esperanto-organizoj?  
 84. Kiujn gravajn tutmondajn esperanto-organizojn vi konas?  
 85. Kio estas IKUE?  
 86. Kiel nomiĝas ĝia organo?
- § 16. 87. Kio estas UEA?<sup>1)</sup>

<sup>1)</sup> Ĉar ĉe la pretigo de ĉi tiuj demandoj la situacio rilate al UEA kaj (aŭ) Internacia Esperanto-Ligo ankoraŭ ne estis klara, ni ne povis difini, ĉu ni devis uzi la is- aŭ la as-formon por kelkaj el la ĉi-tamaj demandoj.

88. Kiam ĝi fondiĝis?
  89. Kiuj estas ĝiaj fondintoj?
  90. Kion celas UEA?
  91. Kio estas UEA-delegito?
  92. Kio estas lia agado?
  93. Kiel nomiĝas la organo de UEA?
  94. Kiujn eldonaĵojn publikigas UEA?
  95. Kion faris UEA dum la milito?
  96. Kiu estis H. Hodler?
  97. Kiuj gvidis UEA post la morto de H. Hodler?
  98. Kiu estis post 1920 direktoro de UEA?
  99. Kie estas la sidejo de UEA?
  100. Kial la situacio kreita per la kontrakto de Helsinki ne kontentigis la esperantistojn?
  101. En kiu kongreso oni trovis solvon pri ĉi tiu problemo?
  102. Kiel nomiĝas la teksto, per kiu estas formulita ĉi tiu solvo?
  103. Kiu organizo estas nun la centro de la tutmonda neŭtrala movado?
  104. Kiu organizo aranĝas la kongresojn?
  105. Kiel oni povas, laŭ la *Interkonsento de Kolonjo*, aliĝi de UEA?
  106. Ĉu oni povas aliĝi al UEA sen interveno de la landa asocio?
  107. Ĉu oni tiam pagas la saman kotizon?
  108. Kio estas la diferenco inter simpla kaj aktiva membreco?
  109. Ĉu fakaj asocioj kaj institucioj ankaŭ povas partopreni en la ĝenerala esperanto-movado?
  110. Kio estas la *Konsilantaro de la esperanto-movado*?
  111. Kion ĝi faras?
  112. Ĉu ĝi povas fari decidojn?
  113. El kio konsistas la *Internacia Komitato* de UEA?
  114. Kie estas la sidejo de la Internacia Esperanto-Ligo (IEL)?
- § 17. 115. Kiujn poemojn verkis d-ro Zamenhof?
116. Kiujn verkojn li tradukis?
  117. Kies pseŭdonimo estas Kabe?
  118. Kiujn verkojn tradukis Kabe?

119. Kiu estas la aŭtoro de la unua tute esperantlingva vortaro (*Vortaro de Esperanto*)?
  120. Kiu tradukis la verkon *Sinjoro Tadeo* de Mickiewicz?
  121. Ĉu Grabovski estis prozo-verkisto?
  122. Kiuj estas la plej gravaj originalaj verkoj esperantaj, kiuj aperis antaŭ la milito?
  123. Kiujn gravajn verkojn tradukitajn el tiu periodo vi konas?
  124. Kiuj estas la plej gravaj postmilitaj esperanto-aŭtoroj?
  125. Kiujn verkojn skribas Jean Forge?
  126. Kiuj aŭtoroj publikigis poemarojn?
  127. Kiu estas la aŭtoro de *Vivo de Zamenhof*?
  128. Kiuj gravaj beletristikaj verkoj estas tradukitaj en Esperanton?
  129. Nomu kelkajn sciencajn verkojn tradukitajn kaj originalajn.
  130. Kiuj politikaj kaj religiaj verkoj aperis en Esperanto?
  131. Kiu estas la aŭtoro de *Historio de Mondolingvo*?
  132. Kiun verkon de Fruictier vi konas?
  133. Kiu kompilis la *Bibliografion de Internacia lingvo*?
  134. Kio estas la ĉefverko de Wüster?
  135. Kiu verkis la *Historion de la lingvo Esperanto*?
- § 18. 136. Kiuj estas gravaj esperanto-gazetoj antaŭmilitaj?
137. Kiuj estas la ĉefaj nuntempaj gazetoj?
  138. Kies organo estas *Esperanto-Ligilo*?
  139. Kie aperas la *Heroldo de Esperanto*?
  140. Kia gazeto estas *Sennacieca Revuo*?
- § 19. 141. Kiam stariĝis la *Delegitaro por alprenado de Lingvo Internacia*?
142. Kiuj iniciatis ĝin?
  143. Kion ĝi celis?
  144. Kiel estiĝis la komitato, kiu devis elekti lingvon internacian?
  145. Kiu devis reprezenti la lingvon Esperanton en la kunvenoj de la Komitato?
  146. Kiun lingvon elektis la komitato?

147. Ĉu oni akceptis ĝin tia, kia ĝi estis?  
 148. Kiu estis la aŭtoro de Ido?  
 149. Ĉu la LK akceptis la proponon de supre nomita komitato?  
 150. Kion faris ĉi tiu komitato?  
 151. Kiun gazeton eldonis la Idistoj?  
 152. Ĉu estas granda diferenco inter Ido kaj Esperanto?  
 153. Kiujn aliajn nuntempajn lingvo-projektojn vi konas?
- § 20. 154. En kiuj jaroj fondiĝis la unuaj laborist-esperantistaj grupoj?  
 155. En kiuj urboj?  
 156. En kiuj landoj ekzistis LEA-oj antaŭ la milito?  
 157. En kiu lando estis la plej forta LEA?  
 158. Kiu naciaj laboristaj esperanto-gazetoj aperis ĝis 1914?  
 159. Kiu parte esperantaj laboristaj gazetoj aperis en Ĉinio?  
 160. Kiam fondiĝis la Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj?  
 161. Kiun gazeton ĝi eldonis antaŭ la milito?
- § 21. 162. Kiu estis la unua internacia laborista esperanto-organizo?  
 163. Kion ĝi celis?  
 164. Kiu estis la fondintoj de *Paco-Libereco (Liberiga Stelo)*?  
 165. Kial ĝi ne sukcesis unuigi grandan parton de la laboristaj esperantistoj?  
 166. En kiu lando loĝis la plimulto el ĝia membraro?
- § 22. 167. Kiu internacia laborista esperanto-gazeto aperis antaŭ la milito?  
 168. Kiu estis ĝiaj redaktoroj?
- § 23. 169. Kiu esperantlingvaj broŝuroj aperis ĉe *Paco-Libereco*?  
 170. Kiu aliaj socialistaj broŝuroj aperis en Esperanto ĝis 1914?  
 171. Kiu eldonis ilin?

- § 24. 172. Ĉu antaŭ la milito okazis laboristaj esperanto-kongresoj?  
 173. Ĉe kiuj neŭtralaj kongresoj okazis apartaj kunvenoj de laboristaj partoprenantoj?
- § 25. 174. Kiel nomiĝis la LEA en Aŭstrio?  
 175. Kiu titolon havis ĝia organo?  
 176. Kiun tendencon reprezentis ALLE?  
 177. Kiam ALLE estis malpermesata de la aŭstria registaro?  
 178. Ĉu *La Socialisto* estis oficiala organo nur de ALLE?  
 179. Ĉu SAT havis multajn membrojn en Aŭstrio?  
 180. Kian organizformon preferis la gvidantoj de ALLE?
- § 26. 181. Kiel nomiĝis la brita LEA en la komenco?  
 182. Kiel ĝi nomiĝas nun?  
 183. Kiom da membroj havis BLEA en la lastaj jaroj?  
 184. Ĉu ĝi eldonas gazeton?  
 185. Ĉu la nuna BLEA estas favora al SAT?  
 186. Kiel nomiĝas la gazeto de SATEB?
- § 27. 187. Ĉu en Francio ekzistas LEA?  
 188. Kiel ĝi nomiĝas?  
 189. Ĉu ĝi havas sekciojn nur en Francio?  
 190. Kiu LEA ekzistis en Francio antaŭ 1932?  
 191. Kio okazis al ĝi en 1932?
- § 28. 192. Kion vi scias pri la laborista esperanto-movado en Germanio?  
 193. Kiel nomiĝis la organo de la germana LEA?  
 194. Kiom da membroj ĝi havis en siaj lastaj jaroj?  
 195. Kiam okazis la skismo en ĝi?  
 196. Kiu nova organo naskiĝis el tio?  
 197. Kiu gazeto servis kiel organo de SEA?  
 198. Kion faris SEA, kiam la germana naci-socialista registraro malpermesis la proletajn organizojn?  
 199. Ĉu ĝi sukcesis en tio?  
 200. Ĉu en Germanio ankoraŭ ekzistas laborista esperanto-movado?  
 201. Ĉu la neŭtrala movado ankoraŭ ekzistas en Germanio?

- § 29. 202. Kiel nomiĝis la hungara LEA?  
 203. Kial oni ne povis facile propagandi Esperanton inter la laboristoj en Hungario?  
 204. Ĉu HESL havis propran organon?  
 205. Ĉu HESL ankoraŭ ekzistas?
- § 30. 206. Kiam restariĝis la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en Nederlando?  
 207. Kiuajn gazetojn ĝi eldonis en la unuaj jaroj post sia restariĝo?  
 208. Ĉu en tiu tempo ĝi rilatis amike al SAT?  
 209. Kia estis ĝia politika starpunkto tiutempe?  
 210. Kiam FLE ŝanĝis tiun starpunkton?  
 211. Kiuajn librojn eldonis FLE?  
 212. Kun kiu organizo FLE kunlaboras en Ekzamena Komitato?  
 213. Ĉu FLE havas sekciojn nur en Nederlando?  
 214. Kiuajn gazetojn eldonas FLE?
- § 31. 215. Kiel nomiĝas la esperanta organizo en Sovetio?  
 216. Ĉu ankaŭ ekzistas neŭtrala movado tie?  
 217. Kiuajn gazetojn ĝi eldonas?  
 218. Kiuajn librojn ĝi aperigis?  
 219. Ĉu SEU havas amikajn rilatojn al SAT?  
 220. Kiel oni uzas Esperanton praktike en Sovetio?
- § 32. 221. Kiam komenciĝas la laborista esperanto movado en Svedio?  
 222. Kiom da membroj havas SLEA?  
 223. Kiel nomiĝas ĝia gazeto?  
 224. Kiuajn librojn SLEA eldonis?  
 225. Kiel rilatas la sveda socialista partio al Esperanto?
- § 34. 226. Kie oni iniciatis en 1919 la revivigon de la internacia laborista esperanto-movado?  
 227. Kiun organizon oni restarigis?  
 228. Kiun gazeton oni eldonis?  
 229. Kiu ludis gravan rolon ĉe ĉi tiuj klopodoj?  
 230. Kiun novan starpunkton propagandis *Liberiga Stelo*?  
 231. Ĉu LS estis propaganda organizo?  
 232. Kiam kaj kie LS transformiĝis en SAT?  
 233. Kiel nomiĝis la unua gazeto de SAT?

- § 35. 234. Kio estas la celo de SAT?  
 235. Kiu kongreso akceptis aldonon al la statuto por pli precize difini la celon de SAT?  
 236. Kiel rilatas SAT al dogmoj?
- § 36. 237. Ĉu SAT estas internacia laŭ organiza strukturo?  
 238. Kion signifas: sennacieca?  
 239. Kio estas sektoro?  
 240. Kiel nomiĝas la estraro de SAT?  
 241. Kion faras la *Generala Konsilantaro*?  
 242. El kiuj ĝi konsistas?  
 243. Kiel la membroj de SAT povas influi la agadon de la asocio?  
 244. Kio estas la devo de SAT-anoj al aliaj SAT-anoj?  
 245. Kiuajn servojn donas SAT al siaj membroj?  
 246. Kio estas SAT-sekcio?  
 247. Kio estas SAT-frakcio?  
 248. Kiuaj frakcioj nun ekzistas en SAT?
- § 37. 249. Kio estas *Sennacieca Revuo*?  
 250. Kiam ĝi ekaperis?  
 251. Kion publikigis SR en la unuaj jaroj?  
 252. Kiam reekvivis SR?
- § 38. 253. Kiam ekaperis *Sennaciulo*?  
 254. Kiu estis ĝia unua redaktoro?  
 255. Kiu redaktis S-ulon post 1928?  
 256. Kiam S-ulo havis la plej altan nombron da abonantoj?  
 257. Kiom estis ĝia amplekso tiam?  
 258. Kiom ofte ĝi aperas nun?
- § 39. 259. Kiu eldonis *La Novan Epokon* antaŭ 1923?  
 260. Kiam ĝi iĝis organo de SAT?  
 261. Kiu redaktis LNE-on en 1930?  
 262. Kion enhavis LNE?
- § 40. 263. Kiu estas la plej gravaj verkoj, de SAT eldonitaj?  
 264. Kiu eldonis la Plenan Vortaron?

- § 41. 265. Kiel SAT ebligas la praktikan utiligon de Esperanto por laboristaj celoj?
- § 42. 266. Kio estas sennaciismo?  
267. Kiu estas la ĉefa formulinto de la sennaciismo?  
268. Kiu sennaciista gazeto aperas nun?
- § 43. 269. Kie okazis SAT-kongresoj?  
270. Kiuj eminentaj personoj estis honoraj prezidantoj de ĝiaj kongresoj?  
271. Kie okazis la lasta SAT-kongreso?
- § 44. 272. Kio estas la konvencio de Goteborgo?  
273. Kiuj LEA-oj agas laŭ la konvencio de Goteborgo?
- § 45. 274. Kiam okazis la skismo en SAT?  
275. El kiuj ĉefaj tendencoj konsistis la membraro de SAT antaŭ tiu skismo?  
276. Kiuj kaŭzis la skismon en SAT?  
277. En kiuj landoj SAT perdis multajn membrojn pro la skismo?  
278. Ĉu la skismo ankaŭ influis la LEA-ojn?  
279. Kio estis la sekvo de tio?
- § 46. 280. Ĉu la SAT-administracio estas ankoraŭ en Germanio?  
281. Kiu nun estas Prezidanto de la PK de SAT?
- § 47. 282. Kiun organizon fondis la skismigintaj SAT-anoj?  
283. Kiun organon eldonis IPE?  
284. Kiel nomiĝas la eldonejo de IPE?  
285. Kiu eldonis *La Novan Etapon*?  
286. Kiajn verkojn eldonis EKRELO?  
287. Kie estis la sidejo de IPE?  
288. Kiuj estas la plej fortaj LEA-oj, kiuj aliĝis al IPE?  
289. Kio estas PEK?  
290. Kiuj kamaradoj organizis ĝin?  
291. Ĉu *Internaciisto* ankoraŭ aperas?  
292. Kio estas la gazeto *Sar Posteno*?  
293. Kie okazis internaciaj konferencoj de IPE?

- § 48. 294. Kio estis TLES?  
295. Kion celis TLES?  
296. Kiel nomiĝis la organo de TLES?  
297. Ĉu TLES prosperis kaj bone funkciis?  
298. Kiu anarkiista gazeto nun aperas?  
299. Kie ĝi estas eldonata?
- § 49. 300. Kio estas ISE?  
301. Kiuj estas la fondintoj de ISE?  
302. Kion ĝi celas?  
303. Kio estas ĝia organo?  
304. Ĉu ISE estas supertendenca?  
305. Ĉu ISE havas la aprobon de ĉiuj socialistoj?  
306. Kie estas la sidejo de ISE?
- § 50. 307. Kio estas IFETT?  
308. Kion ĝi celas?  
309. Kio estas ĝia organo?  
310. En kiuj rondoj ĝi laboras?  
311. Kie estas ĝia sidejo?  
312. Kun kiu organizo IFETT havas intimajn rilatojn?



## Listo de Mallongigoj.

- ALLE — Aŭstria Laborista Ligo Esperantista.  
BLEA — Brita Laborista Esperanto-Asocio.  
BLES — Brita Ligo de Esperantistaj Socialistoj.  
CK — Centra Komitato.  
CO — Centra Oficejo.  
EK — Ekzekutiva (Plenuma) Komitato.  
EKRELO — Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo.  
FLE — Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo.  
FLEA — Franclingva Laborista Esperanto-Asocio.  
GLEA — Germana Laborista Esperantista Asocio.  
GK — Ĝenerala Konsilantaro (vidu ĉe SAT).  
HESL — Hungara Esperanto Societo Laborista.  
ICK — Internacia Centra Komitato.  
IEL — Internacia Esperanto-Ligo.  
IFETT — Internacia Federacio de Esperantista Trafik- kaj Transportlaboristaro.  
IKUE — Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.  
IPE — Internacio de Proleta Esperantistaro.  
ISE — Internacio de Socialistaj Esperantistoj.  
ISR — Internacia Socia Revuo.  
ITF — Internacia Federacio Transportlaborista (ne-esperanta organizo).  
KR — Konstanta Reprezentantaro.  
LEA — Laborista Esperanto Asocio.  
LK — Lingva Komitato.  
LS — Liberiga Stelo.  
PEK — Proleta Esperanto Korespondado.  
PK — Plenum-Komitato.  
SAT — Sennacieca Asocio Tutmonda.  
SEU — Sovetrespublikara Esperantista Unio.  
SLEA — Sveda Laborista Esperanto Asocio.  
SR — Sennacieca Revuo.  
S-ulo — Sennaciulo.

## Tabelo de la enhavo.

	paĝo
1. Unuaj provoj .....	4
2. Volapuko .....	4
3. Deveno de Esperanto .....	6
4. Strukturo de Esperanto .....	6
5. Fundamento .....	7
6. Evoluo .....	7
7. Deklaro pri Esperantismo .....	8
8. Instruado .....	9
9. Ekdisvastiĝo .....	10
10. Kongresoj .....	11
11. Centra Oficejo .....	13
12. Lingva Komitato (LK) .....	13
13. Kontrakto de Helsinki — Internacia Centra Komitato .....	14
14. Interkonsento de Kolonjo .....	15
15. Organizoj .....	16
16. Universala Esperanto-Asocio (UEA) .....	17
17. Literaturo .....	20
18. Internacia gazetaro .....	25
19. La delegitaro — Ido. ....	26
20. Laboristaj grupoj, asocioj, gazetoj (1905-1914) .....	29
21. Liberiga Stelo (LS) .....	30
22. Internacia Socia Revuo (ISR) .....	30
23. Literaturo .....	31
24. Kongresetoj .....	32
25. Aŭstrio .....	33
26. Britio .....	33
27. Francio .....	34
28. Germanio .....	35
29. Hungario .....	36
30. Nederlando .....	37
31. Sovetio .....	38
32. Svedio .....	40
33. En aliaj landoj .....	41
34. Antaŭhistorio de SAT .....	41

	paĝo
35. Celo .....	42
36. Organizformo .....	42
37. Sennacieca Revuo (SR) .....	44
38. Sennaciulo .....	44
39. La Nova Epoko .....	45
40. Literaturo .....	45
41. Praktika utiligo .....	46
42. Sennaciismo .....	47
43. Kongresoj .....	48
44. Rilatoj kun LEA-oj .....	50
45. La Skismo .....	50
46. SAT post la skismo .....	53
47. Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE) .....	55
48. Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj (TLES) .....	56
49. Internacio de Socialistaj Esperantistoj (ISE) .....	57
50. Internacia Federacio de Esperantista Trafik- kaj Translaboris- taro (IFETT) .....	59
Demandaro .....	61
Listo de mallongigoj .....	73
Tabelo de enhavo .....	74





INTERESA HISTORIA  
VERKETO ESTAS:



**Laborista  
Esperanta Movado  
antaŭ la  
mondmilitio.**

DE G. P. DE BRUIN.

36 PAĜOJ  
4 FR. FR.

Eld. Sennacieca Asocio Tutmonda, Parizo.

Ankaŭ havebla ĉe: **LIBRO-SERVO F L E**  
**AMSTERDAM-O. - POSTGIRO 111278 - POSTBUS O 50**

**Sennacieca Asocio Tutmonda  
(SAT)**

atendas vian aliĝon!! Por modesta jarkotizo ĝi metas je via dispono *Jarlibron* (kun adresaro kaj utilaj informoj), du Revuojn vivoplenajn, kun interesa enhavo por ĉiu laborista esperantisto, bele presitajn, ilustritajn kaj redaktitajn en pura zamenhofa lingvo; — plue ĝi rajtigas vin laŭstatute uzi la servojn de interhelpo kaj perado, kiujn funkciigas inter si la membraro de SAT. Ĝiaj revuoj: *Sennaciulo* (kun la *Le Lernanto*) kaj *Sennacieca Revuo* estas disvastigataj tra la tuta terĝlobo kaj apartenas al la plej legataj gazetoj esperantlingvaj. La unua estas 8-paĝa, la dua 16-paĝa. La tarifoj por Nederlando (en 1937) estas jenaj: *Federacianoj*:

1.40 guld. jara membreco kun „Sennaciulo”.  
3.80 „ „ „ „ „Sennaciulo”  
kaj „Sennacieca Revuo”.

1.50 guld. aspiranta aŭ subtenanta (sen gazeto)  
2.75 „ nura jarabono al „Senn. Revuo”.

*Nefederacianoj*:

2.40 kaj 4.80 guld. respektive por la du unuaj kategorioj cititaj ĉi-supre. Kvaron- kaj duon-jaraj partopagoj estas akceptataj.

Adreso de SAT: 67, avenue Gambetta, Paris 20.  
Poŝtĉeka konto je la nomo de SAT-Paris en  
's Gravenhage, n-o 211.533.

*Petu senpagan libro-katalogon.*

## UITGAVEN VAN DE LIBRO-SERVO FLE



**La Komencanto**  
 door G. P. de Bruin. 148 pagina's.  
 Esperanto-leerboek ..... f 0.65  
 gekartonneerd ..... f 0.80



**Ni Kantu**  
 Een bundel van 100 esperantoliederen.  
 36 pagina's ..... f 0.25




**Hoe kan ik het in Esperanto zeggen?**  
 door Th. Buis en F. Faulhaber.  
 28 pagina's ..... f 0.20



**Vóór het Examen A**  
 32 pagina's ..... f 0.25



**Leidraad bij de studie van de Esperanto-Literatuur**  
 door G. J. Degenkamp. 48 pagina's .. f 0.35



## POSTBUS O 50, AMSTERDAM-O., POSTGIRO 111278

**La Konsilanto pri la Esperanta Gramatiko**  
 door G. J. Degenkamp. 120 pagina's f 0.85  
 gekartonneerd ..... f 1.05



**Zakwoordenboekje FLE**  
 door H. W. Alings. 80 blz. .... f 0.12½



**Tra la Labirinto de la Gramatiko**  
 door F. Faulhaber. 340 pagina's, groot formaat,  
 linnen band ..... f 2.50



**La Unuaj Paŝoj en Nova Mondo**  
 door Annie Rebers. Per deeltje .... f 0.12½  
 De 5 deeltjes samen ..... f 0.55



**100 Vragen**  
 over grammatica en onderwijs ten dienste van  
 kandidaten voor het esperanto-examen B door  
 F. Faulhaber ..... f 0.20

